

(EN ESPERANTO)

Esperanto

ISSN 0032-4361

1

1994

中國報 19034/1994

EL POPOLA

# ĈINIO





Floras kaktos.

Foto de LI CHUNGENG

## INTER NI

# NOVJARA MESAĜO

Ĉe la sojlo de 1994 ni kore salutas niajn legantojn kaj deziras al ili feliĉan novjaron. Pasintjare multaj legantoj skribis al ni, ke ili tre ŝatas nian revuon kaj lernis

el ĝi utilajn sciojn, kaj por pli multe koni Ĉinion ili prezentis al ni bonajn opiniojn pri temoj, esperante, ke ni raportos de diversaj flankoj pri tio, kion ili volas legi.

Indas menciigi, ke niaj legantoj, rigardante EPĈ kiel sian propran revuon, prezentis al ni sugestojn kaj proponojn por altigi ĝian kvaliton. Pri tio ni povas diri nenion krom danko. Ni kredas, ke en la nova jaro niaj legantoj helpos nin kiel antaŭe por plibonigi nian laboron.

Nia revuo restos senŝanĝa en aspekto. Por kontentigi la bezonon de niaj legantoj de malsamaj profesioj en diversaj regionoj, ni starigis dek novajn rubrikojn, kiujn ni jam prezentis en la decembra numero.

En la rubriko "Voĉo de Esperantistoj" ni aperigos artikolojn de niaj legantoj pri ilia vivo kaj iliaj lernado, aplikado kaj propagando de Esperanto. Bonvolu sendi al ni kontribuojn.

Ĉar en eks-Sovetio kaj aliaj orienteŭropaj landoj okazis granda ŝanĝiĝo antaŭ kelkaj jaroj, niaj legantoj malpliigis. Pro tio ni sinsekve aperigis en la revuo anoncon pri "Fondaĵo EPĈ-abono" kaj ricevis respondon de iuj esperantistoj. Ni uzos la kolektitan monsumon por helpi nepagipovajn esperantistojn en tiu regiono. Ni ankaŭ decidis, ke ni mem distribuos EPĈ ekde la kuranta jaro. Ni esperas, ke niaj legantoj helpos nin varbi pli da abonantoj.

**La Red.**




# ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Disvolviĝantaj landoj batalas por homaj rajtoj
- 6 *EKONOMIE:*  
Por disvolvi la centran kaj okcidentan partojn de Ĉinio
- 7 Instruistoj en montaro
- 8 Esperplena ĉina petrol-industrio
- 10 Miaj esperantistaj spertoj en Japanio
- 12 L. C. Zaleski-Zamenhof en Pekino
- 13 *VOĈO DE ESPERANTISTOJ:*  
Esperanto kaj modernigo de Ĉinio
- 14 *SUR NIA LIBROBRETO:*  
Bona helpilo por koni Ĉinion
- 15 *POR KOMENCANTOJ:*  
Novjara karto
- 16 *ESP-NOVAĴOJ*
- 17 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*  
Ekspluato de la ekonomia koridoro ĉe Yangzi-rivero  
Ŝanhajo, kapo de leviĝanta drako,
- 25 Inaŭguriĝis la memorhalo por Bainqen Erdini la Deko
- 28 Arbaroj atendas urĝan savon
- 29 *BELA ĈINIO:*  
La Televida Urbo en Ĉinio
- 32 Biciklo-riparisto
- 36 La higiena afero de la ĉina kamparo
- 38 *POR VIA SANO:*  
Kiel liberiĝi de cerba laco?
- 39 *MEM PROVU:*  
Utilo de salo
- 39 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*  
Kion diris Mengzi?
- 40 *ĈINA KULTURO:*  
Etiko de Konfuceo
- 42 1994 — turisma jaro de Ĉinio
- 46 "Armeo de la Familio Ma" en la ĉina atletiko
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *METIARTAĴOJ:*  
Pekinaj harfiguroj  
*SUR LA KOVRILO:*  
Yangpu-pontego super Huangpu-rivero  
Foto de **ZHANG PING**
- 2 Floras kaktos
- 18 Ŝtalistoj en postlaboraj horoj
- 26 Vizaĝaj desegnoj de roloj en pekin-opero
- 34 Juna inventisto
- 44 Roko-grimpado

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (p. 8)
2. Qinghai-provinco (p. 6)
3. Guizhou-provinco (p. 6)
4. Hunan-provinco (p. 6)
5. Xigaze (p. 25)
6. Zhuozhou (p. 29)



# Disvolviĝantaj landoj

**J**UNIE de 1993 okazis en Vieno la Konferenco pri Mondaj Homrajtoj de UN. Ĝi estis internacie alia grava kunveno en la kampo de mondaj homrajtoj post 1968, en kiu okazis sama konferenco en Teherano. La konferenco en Vieno resumis la atingojn kaj mankojn de la kampo de mondaj homrajtoj de post 1948, kiam estis aprobita la Deklaracio pri Homaj Rajtoj de UN, kaj diskutis pri la rilato inter homrajtoj kaj evoluo. Rerezentantoj de multaj disvolviĝantaj landoj traktis fundamentajn starpunktojn rilate al la problemo pri homaj rajtoj kaj alvokis, ke la internacia socio alprenu praktikeblajn paŝojn por forigi ĉiujn obstaklojn kaj plene ĝuigi homajn rajtojn kaj bazajn liberojn al la diverslandaj popoloj.

## BATALO POR HOMAJ RAJTOJ

Homaj rajtoj strikte rilatas la fundamentajn rajtojn kaj proprajn interesojn de la mondaj popoloj. Ili estas la idealo ĉasata de la homaro en longa tempo. Tamen, kadre de la tuta mondo la moderna socio estas ankoraŭ tre malproksima al realigo de la nobla idealo. Tial multaj personuloj daŭre faras ĉion eblan por la idealo. En 1945, kiam fondiĝis la Unuiĝintaj Nacioj, ĝi prenis kiel la celon kaj principojn de "Ĉarto de UN" la internacian amikecan rilaton surbaze de la respekto al egalaj rajtoj kaj memdecidaj principoj de la popoloj, protekton kaj disvastigon de homaj rajtoj. Poste, la Deklaracio pri Homaj Rajtoj de UN anoncis, ke ĉiuj viroj kaj virinoj senescepte devas ĝui fundamentajn rajtojn kaj liberon.

En la batalo por nacia sendependeco kaj ekonomia disvolviĝo la disvolviĝantaj landoj pluapase konis, ke por lando kaj nacio la homa rajto, antaŭ ĉio, devas esti la rajto de vivado de la popolo. Akirinte la rajton de vivado, oni devas alte taksi la rajton de la disvolviĝo de ekonomio, socio kaj kulturo. Tial la rajto de vivado kaj tiu de la disvolviĝo estas la plej gravaj kaj fundamentaj homaj rajtoj.

## GRAVAJ KONTRIBUOJ FAR "LA DEKLARACIO DE TEHERANO" AL HOMAJ RAJTOJ

La Deklaracio de Teherano, aprobita maje de

1968, kontraŭstaras rasismon kaj koloniismon kaj akcentas la rajton de la disvolviĝo de ekonomio, socio kaj kulturo, kio estas grava aldono de la nocio kaj enhavo de homa rajto.

Dum la 20 jaroj de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj de UN ĝis la Deklaracio de Teherano, la popoloj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko faris firman batalon por la nacia sendependeco kaj ekonomia disvolviĝo kaj atingis rimarkindajn sukcesojn. Tamen, la agreso de imperiismo, regado de koloniismo kaj rasa diskriminacio serioze minacas la mondpacon kaj malhelpas la supre diritan batalon.

En la Konferenco pri Mondaj Homrajtoj en Teherano, kontraŭ la opinio de la Okcidento pri neglekto de la rajto de disvolviĝo, reprezentantoj de la disvolviĝantaj landoj emfazis la nedisigeblecon de la politika kaj disvolviĝa rajtoj. La landoj, kiuj ankoraŭ ne akiris sendependecon, antaŭ ĉio devas havi sian nacian memdecidon, dum la landoj, kiuj jam akiris nacian sendependecon, antaŭ ĉio devas turni grandan atenton al disvolviĝo de ekonomio, socio kaj kulturo por garantii al la popolo la rajton de vivado kaj plifortigi la sendependecon de la ŝtato.

La Deklaracio de Teherano postulis, ke ĉiuj land-membroj de UN kaj ĝiaj instancoj alprenu efikajn rimedojn por komplete efektiviĝi la Deklaracion pri Sendependeco Donita al Koloniaj Landoj kaj Popoloj, aprobitan de la ĝenerala asembleo de UN antaŭ ok jaroj. La deklaracio postulis ankaŭ, ke ĉiuj landoj faru ĉion eblan por nuligi la diferencon de ekonomio inter la Nordo kaj Sudo.

## LA UNUANIMA BATALO DE DISVOLVIĜANTAJ LANDOJ

De post la 18-a de decembro 1990, kiam UN decidis okazigi la Unuan Konferencon pri Mondaj Homrajtoj por solvi la problemojn ekzistantajn en la kampo de homaj rajtoj en la mondo, la disvolviĝantaj landoj akordigis sian starpunkton rilate al la batalo por homaj rajtoj kaj per tio multe kontribuis al la Konferenco en Vieno.

Septembre de 1992, en Ĝakarto okazis la Deklaracio de Ĉefoj de Nealiancigitaj Ŝtatoj, kiu aprobis la Dokumenton de Ĝakarto, reasertante,



# batalas por homaj rajtoj

ke la nealianca movado staras por la batalo por fundamentaj homaj rajtoj. De novembro 1992 ĝis marto 1993 en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko okazis prepar-kunveno por konferenco pri homaj rajtoj, kaj estis aprobitaj la Deklaracioj de Tunizio, Sanjoseo kaj Bankoko respektive. La deklaracioj prezentas la kompare unuecan opinion pri la nun ekzistanta problemo pri homaj rajtoj kaj komunan starpunkton de la disvolviĝantaj landoj pri homaj rajtoj.

La Deklaracio de Bankoko kontribuis al la disvolvo de la nocio kaj teorio de homaj rajtoj, surbaze de la praktiko de la disvolviĝantaj landoj en longtempa batalo. La ĉefaj kontribuoj estas jene:

Unue, koncerne la rilatojn inter la homaj rajtoj kaj la rajto de disvolviĝo, la okcidentaj landoj opinias, ke la homaj rajtoj estas pli gravaj ol tiu de disvolviĝo. Rilate tion, la deklaracio montris, ke la rajto de disvolviĝo estas ĝenerala rajto nenuligebla. Ĝi estas konsistiga parto de la fundamentaj homaj rajtoj. Konsidere al la kresko de la diferenco inter la Nordo kaj Sudo, la deklaracio certigis, ke la ĉefa obstaklo por praktiki la rajton de disvolviĝo kuŝas en la malsamaj tavoloj de la monda makroekonomio. Ĝi malaprobas, ke la ekonomia helpo premisas homajn rajtojn.

Due, koncerne la rilaton inter la homaj rajtoj kaj la ŝtata suvereneco, post finiĝo de la malvarma milito, por starigi la tiel nomatan "novan mondan ordon" iuj okcidentaj landoj intervenas en alilandajn aferojn sub la preteksto de homa rajto kaj ignoras la atencojn de homaj rajtoj interne de sia propra lando. Kontraŭ tio, la deklaracio akcentas la principojn respekti la ŝtatan suverenecon kaj teritorian integrecon, ne interveni en alilandajn aferojn kaj ne fari la politikan subpremon sub preteksto de protekto de homaj rajtoj.

Trie, koncerne la rilaton inter la homaj rajtoj kaj la mondopaco kaj sekureco la Deklaracio de Bankoko opinias, ke rasa diskriminacio, rasismo, rasa izoleco, koloniismo, agreso kaj okupado far aliaj landoj minacas la mondan pacon kaj sekurecon. La partoprenantoj de la bankoka konferenco priatentis ĉion, kio malutilas al la homaj rajtoj, ili kontraŭstaras ankaŭ novan naziismon, ekskluzivemon kaj rasan purigon. Ĉio ĉi enkorpiĝas la star-

punkton de la disvolviĝantaj landoj en tiuj problemoj.

La Deklaracioj de Tunizio, Sanjoseo kaj Bankoko spegulis la komunan voĉon de la justamaj kaj pacamaj popoloj, tial oni prenis ilin kiel la bazon de la "Lasta Dokumento" (projekto) de la konferenco en Vieno.

## FORIGU OBSTAKLOJN POR PRAKTIKI FUNDAMENTAJN HOMRAJTOJN

Pro la malracia ekonomia ordo de la mondo, pli kaj pli grandiĝas la diferenco de riĉeco kaj malriĉeco inter la Nordo kaj Sudo. Nun pli ol miliardo da loĝantoj de la mondo vivas vivon malriĉegan. Tio estas la plej granda obstaklo de la disvolviĝantaj landoj por praktiki la rajton de vivado kaj tiun de disvolviĝo. En la konferenco en Vieno multaj disvolviĝantaj landoj deziris, ke la evoluintaj landoj alprenu praktikajn paŝojn en kredito, kapitalo, komerco, monhelpo kaj transdonado de teknikoj por malpliigi la diferencon inter la Nordo kaj Sudo, prosperigi la ekonomion de la disvolviĝantaj landoj kaj ebligi al iliaj popoloj ĝui la homajn rajtojn kaj liberon.

En la konferenco en Vieno reprezentantoj de la disvolviĝantaj landoj riproĉis la intervenon de okcidentaj landoj en alilandajn aferojn sub la preteksto de homaj rajtoj kaj postulis, ke la internacia socio nuligu tiun ĉi grandan obstaklon por praktiki la fundamentajn homrajtojn.

En la konferenco la reprezentantoj de la disvolviĝantaj landoj atentis ankaŭ pri alilanda agreso kaj rasa izoleco. Samtempe kun tio, iuj okcidentaj landoj praktikas du kriteriojn koncerne la problemon pri homaj rajtoj, kio kondukas al grandskala atenco de homaj rajtoj. Tion devas atenti kaj bridi la internacia socio.

La konferenco en Vieno havas gravan signifon, ĉar ĝi koincidis kun la 45-jara datreveno de la publikigo de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj de UN. Oni esperas, ke pere de la konferenco la ĉefaj obstakloj en tiu kampo estos pli frue forigitaj kaj la alta celo de la homaro por plene ĝui la homajn rajtojn kaj liberon estu atingita en la proksima estonteco. ■

# Por disvolvi la centran kaj okcidentan partojn de Ĉinio

de SHEN XI

**L**A tuta lando helpu al siaj centra kaj okcidenta partoj por rapidigi la tiean ekonomian disvolviĝon, tio estas nova ekonomia strategio praktikata de Ĉinio en la nuna tempo.

De la pasintaj jaroj la ĉina ekonomio havas du karakterizaĵojn: unue, ĉu en la orienta parto, ĉu en la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio, ekonomio disvolviĝas je rimarkinda rapideco; due, pli-grandiĝas la diferenco inter la partoj orienta, centra kaj okcidenta. La tendenco de ekonomia disvolviĝo montras, ke la orienta parto evoluas multe pli rapide ol la centra kaj okcidenta partoj. La pokapa industria produktovalor de iuj lokoj de Gansu, Xinjiang (Ŝingĵang), Qinghai (Ĉinghaj), Yunnan, Guizhou (Gujĝou), Tibeto kaj Interna Mongolio estas nur triono de tiu de Jiangsu en la orienta parto kaj tiu de aliaj lokoj estas eĉ malpli ol dudekono. En 1992 la pokapa enspezo de la kamparanoj de Gansu-provinco estis la plej malmulta inter la kamparanoj en la tuta lando. La rapidega disvolviĝo de la orienta ĉemara regiono draste evidentigis la mal-ekvilibron inter regionoj, pri kio ĉinaj ekonomikistoj havis diversajn opiniojn. La ĉina registaro decidis rapidigi la disvolviĝon de la centra kaj okcidenta partoj. Tio sendube havas tre gravan signifon por la ĉiuflanka pordomalfermo kaj plena prosperiĝo de ekonomio de Ĉinio.

La centra kaj okcidenta partoj konsistigas pli ol duonon de la teritorio de Ĉinio. Ili ampleksas

Sichuan, Guizhou, Guangxi (Gŭangŝji), Yunnan kaj Tibeton en sudokcidenta Ĉinio, Shaanxi (Ŝenŝji), Qinghai, Ningxia (Ningŝja), Gansu kaj Xinjiang en nord-okcidenta Ĉinio kaj Hunan kaj Hubei en centra Ĉinio. Kvan-kam la tiea ekonomio disvolviĝas multe malpli rapide ol tiu de la orienta ĉemara regiono, tamen ankaŭ la centra kaj okcidenta partoj havas siajn superecojn kaj bonŝancojn, kiuj plene ebligis rapidi-gi ilian ekonomian disvolviĝon.

Unue, la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio havigis bonan medion al la centra kaj okcidenta partoj. Malgraŭ ke la centra kaj okcidenta partoj leviĝis malfrue, ilia ekonomia disvolviĝo vigliĝis de la pasinta jaro. La totala nacia produktovalor de Shaanxi, Gansu kaj Xinjiang pliiĝas je pli ol 10%, kaj tiu de Qinghai kaj Ningxia je pli ol 7%. Kaj plie, la komercaj havenurboj de la okcidenta parto de Ĉinio estas malfermitaj al aliaj landoj. En 1993 en kvin provincoj kaj regionoj de sudokcidenta Ĉinio ekfunkciis pli ol 3 000 entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj, egale al 2.5-oblo de la totala nombro de la antaŭaj jaroj, kaj enspezis 770 milionojn da usonaj dolaroj.

Due, el la ekonomia disvolviĝo de la orienta parto sekvas, ke altiĝas la prezo de laborforto kaj pliiĝas la elspezo por la vivo. Tiel la orienta parto sendube sin turnos al la okcidenta por pli da profito. Ankaŭ granda kvanto da produktaĵoj de la orienta parto bezonas vastan merkaton de la okcidenta. Konsidere la ekonomian for-

ton kaj la memdisvolvon, la orienta parto havas la kapablon kaj eblon turni sian atenton al la centra kaj okcidenta partoj.

Trie, la centra kaj okcidenta partoj abundas je riĉfontoj kaj talentuloj. La sinteza supereco de la naturaj riĉfontoj de la Sudokcidento okupas la unuan lokon en la ekonomiaj zonoj de Ĉinio, kaj en Lanzhou (Langou), grava urbo de la Nordokcidento, aperis kompleta merkato por interŝanĝi talentulojn. Se abundaj naturaj riĉfontoj premias la ekonomian disvolviĝon de la centra kaj okcidenta partoj, do la supereco de talentuloj fariĝos grandega movforto por ilia ekonomia prosperiĝo.

Por rapidigi la ekonomian disvolviĝon, la provincoj kaj regionoj de la centra kaj okcidenta partoj alprenis la rimedon de interhelpo kaj kuna disvolviĝo. La sudokcidentaj kvin provincoj kaj regionoj pretas intensigi la konstruadon de trafika haveno, telekomunikilo, ŝoseo, fervojo, flughaveno kaj ŝiphaveno, kune disvolvi landliman komercon kaj poreksteran ekonomian kunlaboron, ekspluati komunan regionan merkaton kaj kune entrepreni turismon. Nun iuj el tiuj projektoj estas konstruitaj, kaj la aliaj — konstruitaj. Ekz., la grava Nanning-Kunming-a Fervojo, investita kune de Yunnan, Guizhou kaj Guangxi, estas konstruata kaj espereble estos finkonstruita en 1997, tri jarojn pli antaŭe ol la tempo difinita de la plano.

Vilaĝaj entreprenoj en la centra kaj okcidenta partoj disvolvi-

(Daŭrigo sur p. 14)

**D**EKOJ da kilometroj da zigzaga vojeto finiĝas ĉe rivereto. Laŭ la vojeto, en 1986 s-ro He Xueyu (He Ŝjueju) kun sia novedzino Li Longying venis al Qianqiu- (Ĉjanĉiŭ)-vilaĝo kaj komencis sian malfacilan vivon.

Por kio ili venis instrui tie? Tiu junulo, kiu kreskis en montaro, emocie rakontis al mi sian travivaĵon.

S-ro He povus vivi plu sian komfortan vivon kaj daŭrigi sian instruadon en la antaŭa lernejo. Tamen, post kiam la estro de Qianqiu-vilaĝo vizitis lin, ĉirkaŭ liaj oreloj ŝvebis ĉiam la diro de la vilaĝestro: “Neniu instruas la montarajn infanojn. S-ro He, venu al ni!” Li bone sciis, ke Qianqiu-vilaĝo estas izolita kaj malriĉa. Neniu infano en ĝi sukcesis en la enira ekzameno por mezlernejo. En la pasintaj dek jaroj venis al la vilaĝo 18 instruistoj, sed ĉiuj senescepte foriris poste. Ŝajnis al li, ke la montaraj infanoj atendis lin. Sed li dubis, ĉu li povos labori en tiu loko. Eĉ se jes, ĉu konsentos kun li lia edzino, kiu edziniĝis al li du monatojn antaŭe. Pri tio li provis demandi ŝin. Ekster lia atendo, ŝi senhezite diris: “Mi jam edziniĝis al vi, mi certe sekvas vin tien.” Tiel, s-ro He Xueyu kaj lia edzino venis al Qianqiu-vilaĝo.

La vilaĝo situas en Dawei-montaro de Hunan-provinco. Dekoj da familioj dise loĝas en la tereno kun perimetro de 15 kilometroj. Ĉe la rivereto fluanta preter la vilaĝ-ekstremo lokiĝas la domo de la elementa lernejo Qianqiu, kiu havis tri ĉambrojn. Du el ili estis uzataj kiel klasĉambroj, kaj la alia kiel loĝejo de la geedzoj. Je mencio pri la tiama vivo, s-ro He rememoris multajn malfacilojn en la vivo kaj instruado. Li diris, ke la plej malfacila ne estis la vivo, sed la instruado. En tiu tago, kiam

ZHANG WEN:

## Instruistoj en montaro

komenciĝis nova semestro, li kaj lia edzino purigis la klasĉambrojn kaj atendis la alvenon de lernantoj. Sed du tagoj pasis, neniuj alvenis, ĉar la lernantoj kaj iliaj familianoj jam perdis esperon pri la lernejo pro multfoja ŝanĝiĝo de ĝiaj instruistoj kaj malalta nivelo de la instruado. Li pensis, ke por venigi infanojn al la lernejo necesas antaŭ ĉio gajni la konfidon de la gepatroj de la lernantoj. La geedzoj transiris montojn unu post alia kaj vizitis ĉiujn familiojn en kvar tagoj. Finfine, ili kortuŝis la vilaĝanojn per sia faro.

La elementa lernejo Qianqiu komencis sian novan semestron kaj ĉiuj 38 lernantoj ĉeestis la lernadon. La geedzoj surpriziĝis de la malalta klereco de la lernantoj. El la dek lernantoj de la unua kaj dua klasoj naŭ ne sciopovis nombri de unu ĝis dek; neniuj el la lernantoj de la lernejo povis legi ĉiujn literojn de la ĉina fonetika alfabeto; multaj kvina-klasaj lernantoj ne povis fari eĉ simplajn frazojn; kaj preskaŭ ĉiuj lernantoj estis senbridaj, kiel sovaĝaj ĉevaloj.

La geedzoj decidis kulturigi en ili disciplinemon kaj kortuŝi ilin per sia sincereco. Yang Wusheng (Jang Uŝeng) estis konata kiel petolemulo. Foje, s-ro He informiĝis pri lia naskiĝtago. Kvantam estis malfrue, li vizitis la

familion de Yang. La patro de Yang pensis, ke lia filo faris ion malbonan, kaj tuj vekis lin. Neatendite, s-ro He kun rideto donacis plumon al Yang Wusheng kaj diris: “Feliĉan naskiĝtagon! Mi deziras, ke vi estu elstara lernanto kaj sukcesu trapasi la ekzamenon por eniri mezlernejon en la venonta jaro.” De tiam Yang lernis tre diligente. Kaj poste, li sukcesis en la ekzameno por eniri mezlernejon.

En la lernejo estis samtempe instruataj malsamklasaj lernantoj en sama klasĉambro. Je la komenco li ne alkultimiĝis al tio. Li kaj lia edzino konsultis grandan kvanton da materialoj kaj kaptis ĉiajn ŝancojn por lerni sperton de aliaj lernejoj. Fine ili sukcesis apliki novan instrumentodon, t.e., en sama klasĉambro la altklasaj helpu la malaltklasajn, la bone lernantaj helpu la ne bone lernantajn. Tiel, la lernantoj pli intimiĝis kaj pli diligente lernis.

Yu Jiagu (Ju Ĝjagu) eĉ ne scipovis kalkuli, kiom da okuloj du ranoj havas. Liaj gepatroj malesperis pri li kaj paŝtigis al li bovojn. Sed s-ro He revenigis lin al la lernejo kaj diris al la gepatroj: “La infano estas via filo kaj ankaŭ mia lernanto. Mi ne lasas lin ĉesigi la lernadon.” Li foje-foje donis al Yu preterlasitan lecionon. Kiam la lernanto gajnis ĝojigan progreson, s-ro He emociiĝis ĝis larmoj.

Jaroj pasis. La malgranda domo de la lernejo fariĝis nun duetaĝa domo. Ĉiuj lernoagaj infanoj vizitis la lernejon kaj ĉiuj lernantoj, kiuj finis la lernadon en la elementa lernejo, jam vizitis mezlernejon. Tiam la vilaĝanoj maltrankviliĝis, dirante: “Eble la geedzoj forlasos nin.” Aŭdinte tion, s-ro He ekridis: “La infanoj bezonas min kaj mia kariero troviĝas en la montaro.”



# Esperplena ĉina petrol-industrio


**D**E la 90-aj jaroj, laŭ la strategio “stabiligi la orienton kaj disvolvi la okcidenton”, la ĉina petrol-industrio disvolviĝas kontinue kaj stabile. Ĝi havas nun la tendencan de rapida disvolviĝo.

## ĈINIO NE PLU ESTAS PETROLMANKA LANDO

De la fino de la 50-aj jaroj ĝis la komenco de la 60-aj jaroj, ĉinaj fakuloj pri petrolo trovis la grandan Daqing(Daĉing)-an Olekampon en nordorienta Ĉinio, de tiam Ĉinio ne plu estas petrolmanka lando. Poste, Ĉinio ekspluatigis la grandajn kaj mezgrandajn olekampojn Shengli, Huabei kaj Liaohe. Tiel Ĉinio eniĝis inter la landoj kun granda produktokvanto de petrolo.

Fakte, en Ĉinio abundas riĉfontoj de nafto kaj naturgaso. La ĝenerala direktoro de la Ĉina Kompanio de Petrolo kaj Naturgaso Wang Tao diris, ke en la lastaj jaroj la kompanio organizis fakulojn por antaŭtaksi riĉfontojn de nafto kaj naturgaso de Ĉinio.

Sur putobora platformo



Ili konstatis, ke la rezervokvanto de nafto de Ĉinio estas ĉ. 78.7 miliardoj da tunoj kaj tiu de naturgaso 33 600 miliardoj da kubmetroj. Interalie, la rezervokvanto de subtera nafto estas ĉ. 62.7 miliardoj da tunoj kaj tiu de subtera naturgaso 30 600 miliardoj da kubmetroj. Laŭ antaŭtakso de multaj landoj, la rezervokvanto de nafto kaj naturgaso de Ĉinio okupas la dekan lokon en la mondo.


S-ro Wang Tao diris ankaŭ, ke la jam trovita rezervokvanto de nafto kaj naturgaso de Ĉinio konsistigas nur malgrandan parton de la antaŭtaksita rezervokvanto. En la lastaj du jaroj la jara produktokvanto de nafto de Ĉinio okupis la kvinan lokon en la mondo. En 1993 Ĉinio produktis 140 milionojn da tunoj da nafto, kaj per tio Ĉinio atingis la normon difinitan de la ŝtato por 1995 en la Oka Kvinjara Plano.

## STABILECO EN LA ORIENTO

Plejparto de la olekampo en orienta Ĉinio estas malnovaj olekampo ekspluatitaj en la 60-aj jaroj. Kiel apogilo de la ĉina petrol-industrio ili donis grandan movforton al la ĉina industrio. Tamen, post 30 jaroj plejparto de tiuj malnovaj olekampo estas jam en la stadio de neevitebla malkresko de la produktokvanto.

Alfrontante la nerezisteblan naturan leĝon, la malnovaj olekampo tamen tenis la produktokvanton en stabileco. Iuj el ili eĉ iomete plialtigis ĝin.

Oni ŝuldis la sukceson en la malnovaj olekampo al scienco kaj tekniko. La 35-jara Daqing-a Olekampon deklaris, ke ĝis la jaro 2000 ĝia jara produktokvanto de nafto restos ĉe 50 milionoj da tunoj, ĉar ĝi posedas la teknikon enlasi polimeron sub la teron. Aplikante la teknikon, la olekampon pliiĝas ĉiujare la produktokvanton de nafto je 10%. La provado atestis, ke subteriginte unu



Parto de la petrolkampo Cainan

tunon da polimero, oni povas pliigi almenaŭ 150 tunojn da nafto, alivorte, la olekampo Daqing povas pliprodukti 250 milionojn da tunoj da nafto antaŭ la jaro 2000.

En 1991, Ĉinio akiris grandan sukceson en la tekniko de laŭnivela borado de oleputo, kion oni nomis la dua revolucio de petrol-industrio. Antaŭe oni uzis la metodon de rekta borado kaj tiamaniere oni povis trovi nur unu punkton de subtera nafta tavolo. Por bone koni la naftoenhavan staton de ĉiu tavolo necesis bori plurajn rektajn oleputojn, kun giganta investo. Tamen la laŭnivela borado povas transverse atingi dekojn da tavoloj kun nafto kaj naturgaso. Tiu tekniko estas tre utila por ekspluati nafton kaj naturgason en malnovaj olekampoj. Dank' al apliko de la tekniko, la taga produktokvanto de nafto kaj naturgaso de oleputo estas dekoble pli granda ol tiu de malnova oleputo rekte borita. Tio montris, ke la puto-bora tekniko de Ĉinio jam atingis la avangardan nivelon de la mondo. Nun en la olekampoj Shengli, Zhongyuan (Ĝongjūan) kaj Huabei de la orienta parto de Ĉinio oni jam bori nivelajn oleputojn kaj komencis produktadon.

## EKSPLUATADO DE OLEKAMPOJ EN LA OKCIDENTO

En okcidenta Ĉinio abundas riĉfontoj de nafto kaj naturgaso, tamen ili ankoraŭ ne estas plene eksplua-

titaj. En la venontaj jaroj en la basenoj Tarim, Junggar kaj Turpan-Hami estos trovitaj novaj rezervokvantoj de nafto kaj naturgaso, tial oni prenos la lokon kiel ĉefan produktelejon de petrolo de Ĉinio.

La baseno Tarim, kun areo de 560 000 kvadrataj kilometroj, estas unu el la plej grandaj sedimentaj basenoj kun nafto kaj naturgaso kaj estas ankaŭ unu el la malmultaj gigantaj basenoj en la mondo, kiuj ankoraŭ ne estas plene prospektoritaj kaj ekspluatitaj. Ĝis nun, oni jam trovis tie ses olekampojn kaj 18 strukturojn kun nafto kaj naturgaso. Interalie, kvar olekampoj jam komencis sian produktadon kaj lastjare produktis 1.65 milionojn da tunoj da nafto. Por ĝia prospektado kaj ekspluatado oni faris malkaŝan invitadon al alilandaj entreprenistoj. Nun 68 kompanioj el 17 landoj montris sian deziron partopreni en la ekspluatado.

La olekampo Cainan en la orienta parto de la baseno Junggar estas la unua surdezerta olekampo de Ĉinio. Ĝia jara produktokvanto estas miliono da tunoj da nafto. En la dezerta regiono oni bori oleputojn unu post alia, kun alta produktokvanto de nafto kaj naturgaso, kio prezentis la perspektivon trovi tie gigantan olekampon.

La aliloken-transportado de nafto kaj naturgaso de la olekampoj de Xinjiang (Ŝingĵang) estas la ŝlosila problemo pri ekspluatado de nafto en okcidenta Ĉinio. Tial la trafika departemento de Ĉinio rapidigas la konstruadon de la Lanzhou(Lanĝou)-Xinjiang-a Fervojo. Samtempe kun tio, la Ĉina Kompanio de Petrolo kaj Naturgaso planas konstrui longdistancan petroltransportan linion en okcidenta Ĉinio kaj longdistancan gastransportan tubaron en Xinjiang. Estas decidite, ke la projektado de la tubaro estos farita de alilandaj kompanioj laŭ kontrakto por konstrui aŭtomatan kaj bone administritan tubaron.

La basenoj Tarim, Turpan-Hami kaj Junggar, kun abundaj riĉfontoj de nafto kaj naturgaso, estas multesperigaj, kiel nova apogilo de la ĉina petrol-industrio.

## AL MERKATO

En 1992 la jara produktokvanto de la subtera nafto de Ĉinio kreis novan rekordon, tamen la Ĉina Kompanio de Petrolo kaj Naturgaso havis grandan deficiton en sia konto. Tiu fakto montris, ke la ĉina petrol-industrio kaj ĉiuj olekampoj devas trovi merkaton por sia disvolviĝo.

Por tio, la petrolaj departementoj alprenis serion da rimedoj.

Unue, oni devas raciigi la prezojn de petrolo kaj naturgaso. Antaŭe la prezoj estis difinitaj de la ŝtato kaj nur 6% de la jara produktokvanto de petrolo kaj naturgaso estis venditaj de la entreprenoj mem, la produkta kosto estis pli alta ol la prezo de nafto, tiel ke la entreprenoj malprofitis. Por ŝanĝi la staton, la

(Daŭrigo sur p. 15)

# Miaj esperantistaj spertoj en Japanio

**A**NTAŬ 28 jaroj, kiam mi lernis nian lingvon en universitato, mi estis elektita kiel unu el la dek membroj de la Ĉina Esperanta Delegacio al la 50-a UK en Tokio. Tamen kelkajn tagojn antaŭ ekveturo de nia karavano, ni estis informitaj, ke nia vojaĝo ne eblas pro viza problemo. Mi ege bedaŭris kaj malĝojis pro abortiĝo de la vizito, tamen de tiam mi ekhavas revon. Mi kredas, ke mi certe surpaŝos la teron de Japanio iutage estonte. La 6-an de aŭgusto, 1993, mia revo viziti Japanion fine realiĝis dank' al la afabla invito de la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto.

## LA 80-A KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ

En Japanio mi unue partoprenis la 80-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj. Ĝi okazis de la 7-a ĝis la 8-a de aŭgusto en idilia urbo Kameoka, la centro de Oomoto, kiu antaŭ tio jam gastigis la 60-an kaj 70-an Kongresojn de Japanaj Esperantistoj. Ĉifoje 1 100 personoj kotizis por la kongreso, efektive ĝin ĉeestis pli ol 400, inter kiuj estis 33 fremdlandaj gastoj el 13 landoj. La tri ĉinaj invititoj estis, krom mi, s-ino Xue Meixian, vicdirektorino de la Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia kaj s-ro Zhou Tianhao el Ŝanhajo.

La 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj daŭris nur du tagojn. Aspekte ne tiel pompa, ĝi tamen ege sukcesa. Ĝi, per perfekta organizado, riĉa enhavo kaj serioza diskutado primovada impresis ĉiujn ĉeestantojn profunde. Ĝi ankaŭ fariĝis pli influhava kaj 'prestiga pro la ĉeesto de D-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, nepo de D-ro L.L. Zamenhof, honora membro de UEA, s-ro Simo Milojeviĉ, ĝenerala direktoro de UEA, s-ro Taniguĉi Joŝihisa, urbestro de Kameoka, kaj aliaj honoraj gastoj. La prelego de D-ro L.C. Zaleski-Zamenhof kun titolo "Ponto al la 21-a Jarcento", en kiu li skizis la estontan perspektivon de Esperanto kaj la mondo, kaj la prelego de japana ekonomika kritikisto, varma Esperanto-subtenanto s-ro Sataka Makoto kun titolo "Mondo Malfermata de Esperanto", en kiu li esprimis sian deziron al Esperanto kaj ĝia perspektivo, estis multe atentataj kaj varme akceptitaj.

El la multaj fakkunvenoj la forumo "Kunlaboro de Esperantistoj en Azio kaj Pacifika Regiono" gvidata de s-ro Umeda Yosimi, altiris al si multajn ĉeestantojn. Laŭ lia invito mi dufoje parolis en la kunveno pri la stato de la ĉina Esperanto-movado en la nova situacio kaj precipe pri ĝiaj alfrontitaj novaj problemoj. Miaj paroloj vekis intereson de la aŭskultantoj.

En Japanio la legantoj de El Popola Ĉinio estas plej multnombraj en Azio. En la pasintaj jaroj ili donis al nia redakcio fortan kaj valoran helpon. Mi dankis al la organiza komitato de la kongreso, ke ĝi aranĝis por mi la fakkunsidon de EPĈ-legantoj, en kiu, krom esprimi al niaj legantoj kaj perantoj koran dankon, mi malkaŝis al ili nian ĝojon kaj ĉagrenon en la nuna tempo. Ne ŝparante siajn kuraĝigajn vortojn, la ĉeestantoj donis pli multajn konkretajn opiniojn kaj proponojn pri plibonigo de la enhavo kaj distribuado de la revuo. Ili montris fortan aprobon kaj subtenon al nia paŝo: anstataŭ Guoji Shudian EPĈ-redakcio mem zorgu pri la distribuado de la revuo de la venonta jaro. La amo kaj zorgo de japanaj legantoj al EPĈ min kortuŝis, kaj mi diris al ili: "Kun tiaj bonaj legantoj kaj perantoj, kiel vi, ni ne havas motivon deprimiĝi antaŭ la nunaj malfaciloj. Ni nepre devas pli energie klopodi kaj rekomencos niajn legantojn per plibonigita laboro."

Ankaŭ mia kolegino s-ino Xue Meixian multe profitis de la kongreso. Ŝi sukcese okazigis kunsidon de Ĉina Radio Internacia kun la fervora helpo de gesinjoroj Takeuti. Ŝi ne povis kaŝi sian ĝojon kaj kontenton pro multaj ĉeestantoj, kaj la fonda de Amikaro de Ĉina Radio Internacia ĉe la fino de la kunsido des pli ŝin feliĉigis.

## MI KAJ OOMOTO

Tuj post la fermo de la 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, la memora ceremonio de la 70-a jubileo de la fondiĝo de EPA okazis la 9-an de aŭgusto en Ĉoosej-den en la centro de Oomoto, urbo Ajabe.

Mi unuafoje aŭdis pri Oomoto en 1974. Tiujare en la Japana Esperantista Delegacio al Ĉinio estis ĝentila maljunulo, kiu sin vestis ĉiam per kimono, kun kvietaj rideto sur la vizaĝo. Li ĉiam preĝis momente kun kunmetitaj manoj antaŭ la brusto antaŭ





La aŭtoro (dekstre) kaj s-ro Ito Eizo (la tria de dekstre)

ol preni manĝojn. Li estis s-ro Ito Eizo. Liaj eksterordinaraj vestado kaj sinteno vekis mian scivolemon pri li, sed mi ne kuraĝis lin demandi. Mia maljuna kolego diris al mi, ke li estas oomotano.

En la postaj jaroj, pro aktivaj agadoj de samideanoj de EPA en la internacia Esperantio kaj aliaj okazoj por propagandi nian lingvon kaj tradiciajn kulturon kaj arton de Japanio, ĝi ne nur koniĝis de ĉiam pli multaj homoj, inkluzive de ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ ĝuis grandan estimon pro sia kontribuo al la Esp-movado landa kaj internacia.

En la ceremonio mi estis honore invitita por oferi pinbranĉeton kune kun aliaj reprezentantoj religiaj kaj landaj. Post la ceremonio, iu korea samideano demandis al mi, kion mi pensis dum la plenumo de la ritoj. Mia respondo estis: Tiumomente mi preskaŭ forgesis ĉion en la ĉirkaŭaĵo, mi nur pie preĝis por paco al la tuta mondo, kvankam mi ne estas religiano.

En la solena malfermo de la 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, mi feliĉe sidis sur la podio apud la kvara spiritgvidantino de Oomoto s-ino Deguĉi Kijoko kaj ŝia frato, prezidanto de EPA s-ro Deguĉi Kiotaro. Por diri sincere, kiel religia gvidantino, ŝi estis por mi mistera kaj fremda, tamen kiam ŝi salutis min per Esperanto kaj salutparolis en Esperanto en la memora ceremonio de la 70-jariĝo de EPA, ŝi tuj fariĝis por mi intima, proksima kaj reala. Mi ne scias, kiel mi devas kompreni ŝin, tamen mia koro plenas de respekto, simpatio kaj dank sento al ŝi.

## INTER LA JAPANAJ ESPERANTISTOJ

Post la finiĝo de la memora ceremonio de la 70-a jariĝo de EPA, antaŭ ol mi havis tempon pririgardi la kongresan urbon Kameoka, mi kaj s-ino Xue jam estis forkondukitaj de s-ro Takeuti Yosikazu al la urbo Takatuki.

En Takatuki, sub la zorgema aranĝo kaj akompano de gesinjoroj Takeuti kaj s-ro Nisikawa Toyozo ni vizitis la urbodomon de Takatuki, kie la vicurbestro s-ro Kozo Miyagawa afable akceptis nin kaj havis kun ni tre intiman interparolon. Pro la aktivecoj kaj sindediĉo por Esperanto far samideanoj en



En la sidejo de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj

Takatuki, la urbomagistrato havas simpatian kaj bonan komprenon pri Esperanto kaj forte subtenas la urban Esp-movadon. En 1987 la urbo Takatuki ĝemeliĝis kun ĉina urbo Changzhou pere de Esperanto kaj esperantistoj.

Vizito al la sidejo de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj estas neforgesebla por mi. En tre simpla apartamento plenplena de libroj, diversaj materialoj kaj presiloj ni vidis ne nur la diligentan kaj fruktodonan laboradon de la esperantistoj en la Kansaja regiono, sed ankaŭ ilian oferemon por nia verda afero. Tiutage ni denove renkontiĝis tie kun s-ro Sakamoto Syōzi, kiu ĵus ricevis premion Osaka, la plej prestiĝan premion de la japana Esperantomovado, en la 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, pro sia eldonado de la Unua Kursolibro, tre populara en Japanio, kaj laborado por la bonkvalita verkaro de Miyamoto Masao. Krom prezenti al ni laborojn de la sidejo, s-ro Sakamoto Syōzi kune kun ni rememoris la estimatan s-ron Miyamoto Masao, kiu faris grandan kontribuon al la japana Esperantomovado kaj daŭre nutras ĝin post sia forpaso per sia riĉa verkaro kaj havis profundan amikecon por la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj.

Por ke ni havu pli da kono al Japanio, japanaj samideanoj aranĝis por ni ekster Esperanto la viziton al la Mainichi Novaj-agentejo kaj Mainichi Brodkasta Sistemo en Osako, Osaka Internacia Paca Centro, Nagoja Disaŭdiga Instituto kaj Aiĉi-a Arta kaj Kultura Centro. Kompreneble tio multe larĝigis mian vidkampon. Kompare kun tiuj modernaj konstruaĵoj kaj institucioj, kiuj reprezentas la nuntempan Japanion, la japanaj esperantistoj kaj ilia amikeco al mi tamen estas pli neforgeseblaj por mi. En la ses tagoj post la kongreso mi vizitis la urbojn Takatuki, Osako, Kioto, Nara, Nagojo kaj Tokio, el kiuj kvin okazigis esperantistan kunsidon por nin bonvenigi. Inter ili mi sentis min tute kiel hejme. Mi tute ne bezonis timi perdi vojon, ĉar neniam mankis al ni zorganto kaj vojpgvidanto, oni transdonis nin de mano al mano.

Mia vizito al Japanio estis mallonga, tamen miaj spertoj riĉaj kaj plej grave estas, ke tie mi spertis la plej belan senton de la homaro. Finante mian artikolon mi volas ankoraŭfoje diri al ĉiuj japanaj amikoj, kiuj sukcesigis mian viziton: Koran dankon! ■

# L. C. Zaleski-Zamenhof en Pekino

**L**A 15-an de aŭgusto 1993, nepo de Dr. L. L. Zamenhof, la kreinto de nia lingvo, Dr. L. C. Zaleski-Zamenhof kun sia edzino venis al Pekino post partopreno en la 80-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj kaj la 70-a Jubileo de la fondiĝo de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto. Vespere de la 16-a, samideanoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, Redakcio de El Popola Ĉinio kaj Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio Internacia renkontiĝis kun gesinjoroj Zaleski-Zamenhof kaj pasigis kun ili tre agrablajn horojn.

Dr. Zaleski-Zamenhof estas mezastatura. Kvankam li aĝas preskaŭ 70 jarojn, tamen li estas vigla, parolema kaj humura. Li diris, ke delonge li havas la deziron viziti Ĉinion, kaj ĉi-foje la deziro finfine realiĝis. Dum restado en Pekino ges-roj Zaleski-Zamenhof vizitis Tian'anmen-placon kaj la Grandan Muron. Dum la renkontiĝo li vigle parolis pri Esperanto, siaj ĉiutaga vivo kaj travivaĵoj dum la vojaĝo. De tempo al tempo li krokodilis kun la ĉinaj ĉeestantoj per ĵus lernitaj ĉinaj vortoj, kaj pro tio foje-refoje eksplodis rido ĉe la aŭskultantoj. Dr. Zaleski-Zamenhof estas honora membro de UEA kaj flue parolas Esperanton. En ĉiu loko, kiun li vizitis, esperantistoj akceptis lin kiel honoran gaston. Li diris, ke li esperas partopreni en Esperanto-agadoj kiel simpla e-isto, sed ne kiel nepo de Dr. L. L. Zamenhof.

S-ro Zou Guoxiang, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-

Ligo, esprimis varman bonvenon al gesinjoroj Zaleski-Zamenhof kaj donacis al ili memoraĵojn, inkluzive de silka portreto de Dr. L. L. Zamenhof. S-ro Zaleski-Zamenhof ĝoje akceptis ilin kaj diris: "Estas ege plaĉe kaj interese konatiĝi kaj babili kun vi ĉiuj. Koran dankon pro la simpatia vespero, kiun vi bonvolis organizi. Uzante 'krokodilan esprimon',

ni sentas nin kiel anojn de vi, kaj dum la antaŭaj tagoj, ni estis en Pekino nur simplaj turistoj."

Pri la perspektivo de Esperanto, s-ro Zaleski-Zamenhof opinias, ke Esperanto devas disvolviĝi konforme al la progreso de la epoko. Li diris: "Parolante iun ajn lingvon, oni interkompreniĝas, sed interkompreniĝante en Esperanto, oni ankaŭ kreas etoson de amikeco, oni do pravas."

Ges-roj Zaleski-Zamenhof nun loĝas en Francio kaj havas du filinojn, unu en Francio kaj la alian en Usono. Dr. Zaleski-Zamenhof nun aktive agadas kiel konsulta inĝeniero konstrua.

Ili forlasis Pekinon la 17-an de aŭgusto por reveni al Francio. ■

S-ro Zou Guoxiang (dekstre) donacas memoraĵojn al s-ro Zaleski-Zamenhof.



Ges-roj Zaleski-Zamenhof kaj pekinaj esperantistoj



# Esperanto kaj modernigo de Ĉinio

de HOU ZHIPING



La aŭtoro

**E**N la 30-aj kaj 40-aj jaroj Esperanto faris grandan kontribuon al la ĉina nacia liberiga batalo kontraŭ faŝistoj. En la lastaj 40 jaroj ĝi ludis gravan rolon por konigi al la mondo la novan Ĉinion, ĝiajn longan historion kaj brilan kulturon. Sed kian rolon ĝi ludas nuntempe en la moderniga konstruo, reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio?

## ESPERANTON BEZONAS LA MODERNIGO DE ĈINIO

Realigi la modernigon de Ĉinio fine de la 20-a jc. kaj komence de la 21-a jc. estas ĉefa tasko de la ĉina popolo. Por tio, Ĉinio nepre devas malfermi sian pardonon al la ekstera mondo. Unue ĝi devas koni la eksteran mondon kaj lerni de ĝi, ekz., lerni la avangardajn administrajn spertojn pri sciencoj kaj teknikoj; samtempe kunlabori kun aliaj landoj, enkonduki kapitalojn, instalaĵojn kaj talentulojn; fari kulturalan interŝanĝon kun aliaj landoj. Por kontaktiĝi kun Ĉinio, ankaŭ la ekstera mondo devas koni ĝin, ĝiajn historion kaj nunan situacion. Ĝuste por tiu interkomuniko Esperanto funkcias kiel lingva instrumento.

La disvolviĝo de Ĉinio bezonas longan pacon. Esperanto povas funkcii ĝuste kiel amikeca ponto por interkoniĝo de la diversaj nacioj.

## ESPERANTO DEPENDAS DE MODERNIGO DE ĈINIO

Ĉiuj scias, ke la naciaj lingvoj disvolviĝas surbaze de prospero de la naciaj ekonomio kaj kulturo. La disvolviĝo de Esperanto bazas sin

sur prospero de la mondaj ekonomio kaj kulturo. Estas malfacile imageble, ke E-movado povas disvolviĝi en la mondo ĝenata de ekonomia krizo kaj tie, kie regas malamo kaj milito!

La pasintaj 10 jaroj pruvis, ke ju pli ekonomio prosperas, des pli E-movado progresas.

Realigi modernigon de Ĉinio signifas, ke la ĉinoj adiaŭos povrecon, malsaton kaj senklorecon, ke la ekonomio kaj kulturo de Ĉinio pli prosperos, kaj la popolo vivos pli feliĉan vivon. Tio kreos por la ĉina E-movado pli bonajn ekonomian bazon, kulturalan kondiĉon kaj pacan medion.

Estas menciinde, ke Ĉinio estas granda lando kun 1.1 miliardoj da loĝantoj. En la estonteco, se kvinono de la ĉinoj lernus kaj uzus Esperanton, tio certe ŝanĝus la indiferentecon de iuj landoj kaj regionoj pri Esperanto. En tiu senco oni povas diri, ke modernigo de Ĉinio kaj E-movado estas intime ligitaj kaj la antaŭa povas progresigi la lastan.

## ESPERANTO SERVAS AL LA MODERNIGO DE ĈINIO

Faktoj pruvis, ke Esperanto ne nur devas, sed ankaŭ povas servi al la modernigo de Ĉinio en multaj kampoj.

**EN EKONOMIA KAMPO** la ĉina registaro kreis al alilandaj investantoj multajn favorajn kondiĉojn kaj kuraĝigas alilandanojn starigi fabrikan en Ĉinio kaj vendi siajn produktojn en nia lando. Esperantistoj, laborantaj en ekonomiaj entreprenoj, povas peri kunlaboron al la ĉinaj kaj alilandaj entreprenoj. Ankaŭ la ĉinaj entreprenistoj povas funkciigi sian fabrikan alilande kaj

tie vendi siajn produktaĵojn. Ĉinaj esperantistoj servas al ĉinaj entreprenistoj por trovi kunlaborantojn. Fakte, ili jam tiel faris. Dank' al Esperanto, oni prezentis al aliaj landoj produktaĵojn de sia urbo, importis kapitalojn kaj teknikojn el diversaj landoj kaj regionoj.

**POR TURISMO** Ĉinio havas multajn vidindejojn kaj historiajn restaĵojn. Niaj samideanoj povas organizi turismajn grupojn al Ĉinio aŭ internaciajn E-kongresojn en nia lando. En la pasinteco ĉinaj esperantistoj konigis al siaj E-korespondantoj la lokajn historiajn restaĵojn kaj vidindejojn kaj venigis al Ĉinio turismajn grupojn. Tiele oni ne nur akcelis la interŝanĝon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj, sed ankaŭ akcelis la turisman aferon.

**EN KULTURA, SCIENCA KAJ TEKNIKA KAMPOJ** Esperanto ludas gravan rolon. Alilandaj esperantisto-fakuloj povas prelegi en Ĉinio kaj la ĉinaj eksterlande. Pere de Esperanto oni povas interŝanĝi kaj disvastigi novajn teknikojn kaj inventojn.

**EN AMIKA KONTAKTO** Esperanto ĉiam ludas apartan rolon, ekz., iuj ĉinaj urboj ĝemeliĝis kun alilandaj urboj, dank' al kunlaboro de E-organizoj. En la estonteco oni devas kontinue fari tian aktivadon por akceli la reciprokajn komprenojn kaj amikecon.

Nuntempe, ĉinaj E-organizoj mem kolektas monon por funkciigi diversajn entreprenojn, tio ne nur favoras konstruon de nia lando, sed ankaŭ utilas al E-movado.

Ĉinaj esperantistoj faras sian penadon por plenumi sian historian taskon: servi per Esperanto al la modernigo de Ĉinio! ■



## Bona helpilo por koni Ĉinion

de D.K. JORDAN (Usono)

Su Kaiming: Moderna Historio de Ĉinio laŭ Temoj. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992. Esperantigita de Yang Ren. 210 p. broŝurita. ISBN 7-5052-0049-6: Ĉe ELNA: Kodo MOD002, Prezo \$5.95 (nemembroj)/\$5.65 (membroj)

“Por koni personon,” proponas Su Kaiming en sia unua paĝo, “oni devas scii ne nur liajn nunajn staton kaj konduton, sed ankaŭ liajn familion, socian fonon kaj stadiojn de kreskado. Tio estas sama koncerne nacion.” Per ĉi tiu libreto, do, li celas konigi nin pri sia lando, tiel ke ni pli bone komprenu ĝian nunan staton. Efektive, li prezentas nur politikan historion, tamen utilan. Ĉi tiu estas la ĝis nun plej ampleksa historio de moderna Ĉinio havebla en Esperanto. Ĝi multilate estas perfekta por tiu rolo: interesa kaj informa, nek tro longa nek tro supraĵa. Mi ne dubas, ke ĉiu ajn leginto pli profunde komprenus hodiaŭan Ĉinion; jen precize la celo de la verkinto!

La historio komenciĝas per la unua milito pri opio (komenco de okcidenta imperiismo kontraŭ Ĉinio, la momento ekde kiu la komunistaj historiistoj kutimas kalkuli la historion de “moderna” Ĉinio) kaj progresas tra 86 ĉapitroj vicigitaj laŭ historia ordo. Ĉiu ĉapitro indikas klare la temon en

la titolo (“Rolo de Rusio en la dua opia milito”, “Kial Ĉinio ne fariĝis forta potenco kiel Japanio”, “La longa marŝo komenciĝas” ktp.), do kvankam bedaŭrinde mankas indekso, oni facile trovas plej multajn aferojn. Multaj interesaj fotoj bone kontribuas al la libro kaj pli grandan intereson kaj pli grandan edukan valoron. (Komprenoble, se oni verkas rekte en Esperanto, la historio inkluzivus ankaŭ informon pri nia movado en Ĉinio dum la samaj epokoj.)

La historio de la popola respubliko mem komenciĝas nur sur la paĝo 170, do okupas nur 20 procentojn de la libro. Plejparte oni legas pri la antaŭa strebo de la laborista popolamaso venki kontraŭ etburĝa pensado, imperiismo, kaj feŭdismo (!) por fondi ŝtaton komunistan, ĉiam gvidatan per la pensoj de Mao Zedong. S-ro Su prezentas al ni do tre ortodoksan komunistan analizon, per konceptoj kaj vortoj ankoraŭ ne eksmodaj en Ĉinio.

La traduko de Yang Ren estas en absolute norma Esperanto. Rilate al la Kultura Revolucio, li skribas ĉi tie pri “grandideografia afiŝo” \*, ekzemple, ne (kiel dum tiu epoko mem) pri “dazi-baŭo”. Tamen kelkaj nomoj estas literumitaj laŭ diversaj normoj malsamaj. Kvankam plej multaj ĉinaj nomoj aperas en la jam in-



ternacie norma kaj vaste konata sistemo “Hanyu Pinyin”, tamen oni legas pri “Ĉjang Kajŝek” kaj “Sun Jatsen” anstataŭ Jiang Jieshi kaj Sun Zhongshan, kaj pri “Kuomintang” anstataŭ Guomindang. Legante ĉi tiujn esperantigitajn anglajn nomojn (bazitajn sur sudaj ĉinaj dialektoj kaj antaŭaj normoj), oni povas facile imagi la anglan tradukon de ĉi tiu libro esti konstanta helpilo de la esperantigisto. (Krom tiuj, troviĝas ankaŭ malnovaj Esperantaj loknomoj: Ŝanhajo, Nankino ktp.)

En mia ekzemplero, la inko ŝmiriĝema elpaperiĝas sur la finprojn. Tio estas neofta en ĉinaj libroj. Espereble ne ĉiuj ekzempleroj estas tiaj.

Por tiuj kiuj deziras per Esperanto pli profundigi sian komprenon pri moderna ĉina politika historio, ĉi tiu libro estas impona helpilo.

\* Laŭ mia kompreno, la ĉina *dazibao* signifas ĝuste “grandideografiaj-afiŝo”. Ĉu oni volas ĝustigi tion? (Red.)

el “ESPERANTO USA” 1993 (2)

(*Datŭrigo de p. 6*)

ĝas multe malpli rapide ol tiuj en la orienta ĉemara regiono. Forigi tiun ĉi malfortan ĉenon kaj energie disvolvi vilaĝajn entreprenojn estos la ŝlosilo por la ekonomia disvolviĝo de la centra kaj okci-

denta partoj. Pro tio, koncerna departemento de Ĉinio decidis ĉiujare asigni kvin miliardojn da juroj por disvolvi la vilaĝajn entreprenojn en la centra kaj okcidenta partoj kaj doni al ili avantaĝon pri imposto kaj uzo de talentulo.

La ekonomia postĝinteco de la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio estas historia postlasaĵo. La ŝanĝiĝo de la stato bezonas longan tempon. Tamen, ili jam antaŭenpaŝas kaj kredeble fariĝos alia ekonomia fokuso post la orienta ĉemara regiono. ■

**V**ENOS la nova jaro, sed li ne ĝojis. Li ricevis novjaran salutkarton, kiun li ne atendis.

Lia edzino forpasis antaŭ unu monato. Li dronis en granda malĝojo. Li indiferece rigardis la mondon kaj vivis malvigle. Kaj lia respondo al la konsoloj estis nur unu vorto: "Mortis mia koro." Li sola restadis hejme, trinkante akran brandon.

Li ne povis diveni, kiu sendis al li la karton. La desegno sur la karto estas tre simpla: sur blanka fono estas verda folio, super kiu estas la vorto "Silenta Beno". Li ne trovis la nomon de la sendinto, sed legis sur la karto jenajn vortojn: "Ne divenu, nek serĉu la sendinton. Sciu, ke iu en la mondo silente benas vin. La vivo ankoraŭ estas bela, plena de amo. Nova printempo kunekzistos kun vi!"

Li legis kaj relegis, kaj lia koro estis varmigita. Kiu sendis la karton? Evidente la sendinto penis kaŝi sin, kaj la strekoj de la skribaĵo estas tiel rigidaj, ke oni ne povas rekoni la skribkarakteron. Li volis serĉi la sendinton.

En la sekvanta tago li iris al laboro. Li detale observis siajn kamaradojn. Li salutis ilin per rideto. Tio estis lia unua rideto post la forpaso de la edzino. La kamaradoj respondis al li per rideto plena de kamaradeco. Li ne povis certigi al si, ĉar ĉiu povus esti la beninto.

En bela rideto kaj mallaŭta saluto li sentis, ke la vivo vere estas plena de amo. Degelis lia frostigita koro. Lia koro ne mortis.

"Ne divenu, nek serĉu la sendinton", li rememoris tiun vorton kaj kredis, ke li ne povos trovi la sendinton. Li refoje elkovertigis la karton kaj karesis ĝin. Subite la poŝtstampo sur la koverto

(*Datirigo de p. 9*)

Ĉina Kompanio de Petrolo kaj Naturgaso levis iom post iom la prezon de parto da petrolo, kies prezo estis difinita de la ŝtato, kaj samtempe permesas al la koncernaj entreprenoj vendi sian pliproduktitan petrolon laŭ prezo de la merkato. La ĝenerala direktoro Wang Tao informis, ke la kompanio jaron post jaro plimultigos la procenton de la petrolo vendita de entreprenoj mem. Tio ne nur malmultigos gigantan subvencion donitan de la ŝtato al la petrol-industrio, sed ankaŭ plivigliĝos la entreprenon.

Due, oni devas plue plivastigi la malfermitajn kampojn kaj skalojn. En la lasta januaro la ĉina registaro decidis, ke krom la antaŭaj 11 provincoj kaj regionoj en la sudo de Ĉinio, ankaŭ dek provincoj kaj

# Novjara karto

atentigis lin: la karto estis sendita registrite. Do li venis al la poŝtoŭicejo.

Oni diris al li: "Jes, ni bone memoras la registrinton. Antaŭ du monatoj venis maldika malsanulino kun palaj lipoj. Ŝi diris, ke ŝi suferis nekuraceblan malsanon kaj baldaŭ forlasos la mondon. Ŝi petis nin elsendi tiun ĉi novjaran salutkarton... Ni pensas, ke ŝi jam forpasis, ĉar ŝi diris, ke ŝi mem venos sendi la karton, se ŝi povos ĝisvivi la jarfinon."

Li jam sciis la sendinton. Li profunde riverencis por la forpasinta edzino. ■

municipoj en la nordo de Ĉinio kunlaboros kun aliandaj kompanioj en ekspluatado de subtera nafto, kaj ke oni elektos 14 lokojn en Daqing kaj aliaj naŭ malnovaj olekampoj por fari kunlaboron kun la celo kreskigi la produktokvanton de nafto. Tiu kunlaboro donos teknikan efikon kaj monprofiton al la ĉina petrol-industrio.

Nun la kresko de la produktokvanto de petrolo kaj naturgaso de Ĉinio ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj la prospektora nivelo estas tre malalta. Tamen estas tre granda la latentata forto de la petrol-industrio de Ĉinio. Oni antaŭtaksis, ke en 1995 la produktokvanto de la subtera nafto de Ĉinio atingos 145 milionojn da tunoj kaj je la fino de la kuranta jarcento superos 200 milionojn da tunoj. ■


## ESP-NOVAĴOJ

*Ni bonvenigas Esperantajn artikolojn, Esp-novaĵojn kaj fotojn de ĉiu ajn Esperanta organizo aŭ individuo. Bonvolu sendi kontribuojn al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio.*

**La Red.**

● La 8-an de septembro 1993 japana esperantisto Ueda Tomohiko, prof. de la Virina Universitato Showa, vizitis la Ĉinan Esperanto-Ligon kaj la redakcion de "El Popola Ĉinio" kaj konigis la Esperantan instruadon en japanaj universitatoj kaj la 80-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj.

● En septembro 1993, norve-



La norvegaj esperantistaj geedzoj  
Ingmar Molin

gaj e-istaj geedzoj Ingmar Molin kaj Karin Pladsen pasigis tri semajnojn en Chengde, Hebei-provinco, kaj en Pekino. Ili kontaktiĝis kun lokaj e-istoj kaj vizitis la redakcion de EPĈ.

● La 1-an de septembro 1993

inaŭguriĝis la Shitao-a Fremd-lingva Lernejo de Chongqing (Ĉongĉing) fondita de la Chongqing-a E-asocio de Sichuan-provinco. Direktoro de la lernejo estas Li Ren, prezidanto de la asocio. La lernejo funkciigos E-kurson kiel nedevidan post unu jaro en la 2-a klaso.

● La 24-an de aŭgusto 1993 en la urbo Shenyang ekfunkciis la Amatora Radio BY2SY de la Liaoning-a Esperanto-Asocio. La aparato estas donacita de la Japana E-klubo de Radio-Amatoroj, kies delegitoj Tanaka Yashikatsu, Ito Akiko kaj Takeuchi Reiko partoprenis la inaŭguron.

● Inter la 20-a kaj la 23-a de julio 1993 okazis en Barcelono la Oficiala Antaŭkongreso de la 78-a UK, kun s-ro Salvador Aragaj kiel prezidanto de sia Organiza Komitato. Pli ol 130 ĉeestantoj, venintaj el dudek landoj, deklaris rezolucion, ke individuaj homaj rajtoj en la tuta mondo estas ankaŭ en akordo kun la celo de la interna ideo de Esperanto, ke la ĉeestantoj protestas kontraŭ ĉiu perforto, apelacias al internaciaj instancoj uzi siajn influon kaj povon por ĉesigi la teruran kaj brutalan militon en eks-Jugoslavio, protestas kontraŭ ĉiuj diskriminacioj: lingva, kultura kaj religia, antaŭ ĉio kontraŭ

la "etna purigado", kaj montras ke per la Internacia Lingvo Esperanto ĉiuj baroj estas for kaj ke oni povas esti kune en amika, tolere-ma kaj paca atmosfero.

● En Macon, Francio, la 29-an de aŭgusto 1993, la Interregiona Nacia Konsilianaro de la Verda Movado, majoritate voĉbalotis la aprobon de 4-paĝa dokumento pri Esperanto, preparita kaj proponita de la interna komisiono. Dum la debato, verda Eŭropa deputito Bruno Boissiere efike kaj vigle argumentis favore al la internacia lingvo kaj klopodos ĉe la Eŭropa Parlamento por enkonduki Esperanton.

● ATOS estas juna firmao de aktivaj komputilaj programistoj en Žilina de Slovakio kaj specialiĝas en porlernejaj programoj, precipe sur matematika tereno. La direktoro de ATOS estas multjara esperantisto, ing. Vladimír Němec. Ili kunlaboras kun nederlanda samideano Tammo Kanter en produktado de nederlandlingvaj versioj de ambaŭ programoj. Kaj en relative mallonga tempo produktiĝis la programoj ankaŭ en la slovakaj, ĉeĥaj, nederlandaj kaj anglaj lingvoj, krom en Esperanto. La adreso: ATOS, Zvolenská 5 010 08 Žilina, Slovakio.

● Iltis-Eldonejo fondita en januaro 1989 ĉefe agadas en eldonado de libroj kaj revuoj. Nun haveblas la listo de ĝiaj livereblaj titoloj kaj la teksto "Literatura Manifesto '87", kiun subskribis pli ol 100 esperantistoj el 22 landoj. La adreso de la Eldonejo estas: Postfach 1530, D-66365 St. Ingbert, Germanio.

Partoprenantoj de la Oficiala Antaŭkongreso de la 78-a UK



S-ro Noel Brown, direktoro de UN, interparolas kun esperantistinoj.





### LHASA-TREZOREJO EKSPLUATOTA

La 1 300-jara budhisma sanktejo Lhasa havas sennombrajn vidindaĵojn. La majesta Potala-palaco, ore brilanta Dazhao-templo, Tri Grandaj Temploj de la Flava Sekto de lamaismo kaj pitoreska ĝardeno Norbu ĝuas renomon en- kaj eksterlande. Lhasa estas unu el la unuaj historiaj kaj kulturaj urboj de Ĉinio.

La tieaj montoj, riveroj kaj lagoj, tradiciaj moroj kaj kutimoj, mistikaj religioj, ĉarmaj neĝmontoj kaj vastaj stepoj servas kiel naturdotita turisma loko; bovoj kaj ŝafoj, sin paŝtantaj ĉie sur la stepoj, donas sufiĉe da krudmaterialo al la tibetanaĵoj de tapiŝo kaj ledo; la lokaj produktaĵoj kordicepo (*Cordyceps sinensis*), fritilario kaj mosko estas bone konataj; eritrostikto (*Sedum erythrostictum*), konata kiel ginsengo sur la altebenaĵo, abundas kaj havas grandan debiton; granito, marmoro kaj kalkoŝtono havas grandan rezervon kaj dislokiĝon; kaj la minoj de kupro, plumbo, zinko kaj arĝento estas fajnaj kaj facile ekspluateblaj.

Post la paca liberiĝo de Tibeto en 1951 okazis granda ŝanĝiĝo en la antikva urbo Lhasa. Ĝi kreskis de tri kvadrataj kilometroj antaŭ la liberiĝo al 42 kvadrataj kilometroj. Estas bonvenaj al ĝi en- kaj eksterlandaj fakuloj por disvolvi la turisman aferon, metiindustriion, valorajn ĉinajn drogherbojn kaj brutajn produktaĵojn kaj entrepreni konstruadon de fundamentaj instalaĵoj.

En Lhasa oni ellaboras por en- kaj eksterlandaj investantoj serion da avantaĝaj politikoj rilate al bieno, imposto, monprunto kaj importa-eksporta komerco. Iuj ĉinaj kaj alilandaj entreprenistoj esploris la urbon, starigis sian oficejon kaj faris investadon en ĝi por funkciigi entreprenojn.

### ĈINAJ PORCELANAĴOJ KAJ ILIA ORIGINO

Porcelanaĵoj estis unu el la grandaj inventoj de la antikva Ĉinio. La ĉefaj porcelanaĵoj de Ĉinio estas bluaj, blankaj kaj buntaj. Krome, estas ankaŭ originalaj blankaj porcelanaĵoj kun kaŝitaj bluaj desegnaĵoj de Jingdezhen (Ĝingdeĝen) kaj nigraj porcelanaĵoj de Jian(Ĝjan)-bakujo.

En Tang-dinastio (618-907) bluaj porcelanaĵoj maturiĝis en tekniko de farado. En Song-dinastio (960-1279) estis fame konataj Ru(Ĵu)-, Guan- kaj Jun(Ĝjun)-bakujoj por bluaj porcelanaĵoj, kaj ankaŭ Di-bakujo por blankaj porcelanaĵoj. Post Ming-dinastio (1368-1644) Jingdezhen fariĝis centro de la porcelanaĵa industrio kaj senĉese disvolviĝis la tekniko por produkti kolore glazuritajn kaj desegnitajn

porcelanaĵojn. Ordinaraĵoj porcelanaĵ-bakujoj jam troviĝis ĉie en la lando. Post Tang- kaj Song-dinastioj grandkvante vendiĝis ĉinaj porcelanaĵoj en aliaj landoj kaj sekve la tekniko por fari ilin enkondukiĝis en aliajn landojn.

Estas malsamaj diroj pri la origino kaj invento de ĉinaj porcelanaĵoj. Iuj opinias, ke ĉinaj porcelanaĵoj originis en la nordo de Ĉinio, ĉar oni elterigis glazuritan grizan vinujon en ruino de Shang-dinastio (la 16-a jc. — 1066 a.K.) en Zhengzhou (Ĝengĝoŭ). Aliaj opinias, ke ili originis en suda Ĉinio, ĉar oni tie elterigis malmolan argilaĵon kun geometriaj vejnoj sur ĝi produktitan en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.). Kaj la triaj opinias, ke ili originis en Jin(Ĝin)-dinastio (265-420), ĉar la ideografiaĵo "porcelano" aperis unuafoje en tiamaj notoj pri porcelanaĵaj koloro kaj produktaĵoj.

Por klarigi la originon de ĉinaj porcelanaĵoj prof. Ye Hongming, fakulo pri antikvaj ĉinaj ceramikaĵoj, kaj aliaj konstatis post dekeljara esplorado, ke ĉinaj porcelanaĵoj originis en la Orienta Han-dinastio (25-220).

En Shangyu de Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco estas 300 ruinoj de antikvaj bakujoj, inter kiuj pli ol 20 apartenas al Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.). Ye Hongming kaj aliaj opinias, ke en la Orienta Han-dinastio ĉie en Shangyu funkciis alttemperaturaj

Ru-porcelanaĵoj imite faritaj laŭ tiuj de Song-dinastio



Long-bakujoj. La elterigitaj porcelanaĵaj pecoj de Long-bakujo estas bone glazuritaj kaj la glazuro firme alĉiĝas al la porcelanaĵo. Inter la glazuro kaj korpo videblas kristaloj en formo de strio aŭ stelo, kun senfenda surfaco. Ili estis elfaritaj sub la temperaturo de 1 300°C kaj la akvosorba kvanto atingis malpli ol 0.5%. Ĉio ĉi estas necesa por fari porcelanaĵojn. Tial ili konkludis, ke en Han-dinastio oni finis la transiron de argilaĵo al porcelanaĵo kaj veraj porcelanaĵoj originis antaŭ 1 800 jaroj, kiam regis la Orienta Han-dinastio, en la nuna Shangyu de Zhejiang-provinco.

# Ŝtalistoj en postlaboraj horoj



En amuza vespero

La Ĉefurba Ĝenerala Ŝtala Kompanio estas unu el la plej grandaj entreprenoj de Ĉinio. Ekde la reformado kaj pordomalfermo la produktado kaj profito de la kompanio okupis la unuan lokon. Akirinte tiun sukceson, la laboristoj de la kompanio ankaŭ kreis sian enhavoriĉan kulturalan vivon. En la pasintaj jaroj la laboristoj organizis sin en 37 societojn de literaturo kaj arto, sporto, pekina opero, kaligrafio, ŝako, pentrado k.a. La laborista sindikato disponigis al la societoj ejojn kaj necesajn instrumentojn. Dank' al tio la societoj pli kaj pli vigliĝis kaj ofte gajnis premiojn en laboristaj konkursoj de urba kaj distrikta niveloj.

Kaligrafo Gao Yufeng (dekstre) kaj kaligrafio-amatoroj de la Ĉefurba Ĝenerala Ŝtala Kompanio




Fotoj de LI CHUNGENG



Konkurso de ĉina ŝako

Foto de LI FACHI



En la korpo-ekzercejo de la kompanio

Antaŭ prezentado de pekina opero





# Ekspluato de la ekonomia koridoro ĉe Yangzi-rivero

de JI PING

**P**OST 15-jaraj reformado kaj pordmalfermo en Ĉinio la ĉina registaro decidis ekspluati Pudong-distrikton de Ŝanhajo ĉe la enfluejo de Yangzi-rivero, por ke ĝi servu kiel ekzemplo por ekspluati la tutan regionon ambaŭflanke de la rivero. Tio signifas, ke pordmalfermo de Ĉinio komencita ĉefe en la ĉemaraj regionoj sin daŭrigis en la ĉeriveraj regionoj.

Yangzi-rivero kun la totala longeco de 6 300 km estas la 3-a granda rivero en la mondo. Fontante el la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo en okcidenta Ĉinio, ĝi fluas orienten tra 8 provincoj kaj municipoj kaj finfine sin ĵetas de Ŝanhajo en la Orientan Ĉinan Maron. Kiel unu el la luliloj de la ĉina nacio, la baseno de Yangzi-rivero ĉiam estas la regiono kompare progressa en kulturo kaj ekonomio.

En la baseno de Yangzi-rivero kun areo de 1.8 milionoj da kvadrataj kilometroj estas 24 milionoj da hektaroj da agro, t.e. 1/4 de la totala areo de agro de Ĉinio, kaj vivas pli ol 400 milionoj da loĝantoj, t.e. pli ol 1/3 de tiuj de Ĉinio. La totala produktovaloro de la regiono ĉe Yangzi-rivero konsistigas 1/5 de tiu de Ĉinio, kaj tie la poka-

pa produktovaloro estas duoblo de tiu de la tuta lando.

La baseno de Yangzi-rivero posedas favorajn geografiajn kondiĉojn por navigacio. La delto de Yangzi-rivero havas duoblan superecon de "ora marbordo kaj akvovojo". Sendube tio multe favoras al la ekstera komerco per mara kaj rivera navigacio.

En la baseno estas kompare solida industria bazo. En la meza kaj malsupra basenoj de la rivero kuŝas 28 urboj grandaj kaj mezgrandaj. La delto de Yangzi-rivero kun Ŝanhajo kiel la centro estas sinteza industria bazo de prilaborado, la plej granda en Ĉinio. La tiea prilabora produktovaloro superas 2/3 de la totala industria produktovaloro de la delto. En Ŝanhajo, Nankino, Wuhan kaj Chongqing prosperas modernaj petrokemia, mekanika, elektronika, ŝtala kaj aliaj gravaj industrioj.

Kun agrabla klimato kaj multaj akvoutiligaj konstruoj, la baseno abunda je terkulturaj produktaĵoj fariĝis ĉefa agrikultura bazo de Ĉinio. La Jiangnan-a Ebenaĵo kaj la regionoj ĉe Dongting-lago, Poyang-lago, Chaohu-lago kaj Taihu-lago estas gravaj bazoj de

grenoj, kotono kaj oledonaj plantoj de Ĉinio. En la lastaj jaroj tie la vilaĝaj entreprenoj rapide disvolviĝis, precipe tiuj en la delto de Yangzi-rivero, kies produktovaloro jam konsistigas 39% de la totala produktovaloro de la vilaĝaj entreprenoj de Ĉinio.

Tamen pro tio, ke en la pasinteco Ĉinio metis sian graviton de pordmalfermo en ĉemaraj regionoj, ekonomie la baseno de Yangzi-rivero disvolviĝis kompare malrapide. Nun la pordmalfermo praktikata en la baseno kaj konstruo de ekonomia koridoro ĉe Yangzi-rivero profundigos la reformadon kaj pordmalfermon de Ĉinio. La delto de Yangzi-rivero estos kompare frue modernigita regiono de Ĉinio kaj samtempe ĝi fariĝos modelo por la tuta baseno de Yangzi-rivero en la ekonomia disvolviĝo. Tiel en Ĉinio formiĝos 2 ĉefaj ekonomiaj aksoj, t.e. la orienta marbordo etendiĝanta de sudo al nordo kaj la regiono ĉe Yangzi-rivero de oriento al okcidento.

En la jaro 1994, en nia revuo estos nova rubriko "Ĉe Yangzi-rivero" por raportoj pri la ekonomia disvolviĝo de la baseno de Yangzi-rivero. ■

# Ŝanhajo, kapo de leviĝanta drako

Teksto de **JI PING**

Fotoj de **LIU SIGONG**

**S**ANHAJO, la ekstrem-orienta urbo plej frue influita de la okcidentaj prirabantoj en la 19-a jarcento, estis fiŝista vilaĝo ĉe la enfluejo de Yangzi-rivero sur la orienta marbordo de Ĉinio antaŭ centoj da jaroj. En la 30-40-aj jaroj ĝi fariĝis fama financa kaj komerca centro en la Ekstrema Oriento. Ekde la 50-aj jaroj Ŝanhajo firme sidis sur la "ekonomia trono de Ĉinio" per sia solida bazo de la industrioj kaj scienc-teknika forto.

Sed en la 80-aj jaroj, rapide stariĝis la kvar specialaj ekonomiaj distriktoj reprezentataj de Shenzhen (Ŝenĝen). Kvankam Ŝanhajo fariĝis en 1984 unu el la 14 malfermitaj urboj ĉe la ĉina

marbordo, kaj la distriktoj Hongqiao (Hongĉjaŭ), Caohejing (Caŭheĝing) kaj Minhang en Ŝanhajo estis prenitaj kiel ekspluataj ekonomiaj regionoj, tamen Ŝanhajo progresis tro malrapide, en komparo kun la sudaj marbordaj regionoj. La decido de la ĉina registaro pri malfermo kaj ekspluato de la regiono Pudong favoris Ŝanhajon per bona ŝanco, kaj de tiam Ŝanhajo surpaŝis novan ŝtupon.

## RUDIMENTO DE "ORIENTA ŜANHAJO"

En Pudong leviĝis multaj domoj. La televida turo "Orienta Perlo" en alto de 400 m estas konstruata. La loko sub la turo estas la Financa-komerca Regiono Lu-

## SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO



La ŝanhaja televida turo en konstruado

jiazui (Luĝjazuj), unu el la kvar ekspluataj regionoj en Pudong.

Pudong okupas orientan parton de Ŝanhajo kaj kovras 350 kvadratajn kilometrojn. Oriente de ĝi estas la Orienta Ĉina Maro kaj norde — Yangzi-rivero. Pudong altiras al si ĉinajn kaj alilandajn entreprenistojn ĝuste per sia



La regiono Pudong

situo sur la interkruciĝo de la “Ora Marbordo” kaj la “Ora Navigvojo”. Sed pro la historiaj kialoj, Pudong kaj la okcidenta parto de Ŝanhajo disvolviĝis malegale. Kiel oni kutime diras, sur blanka papero oni ĉion povas pentri. Pudong estas kiel blanka papero. Por bonvenigi grandskalan ekspluaton, Ŝanhajo investis 15 miliardojn da juanoj por 10 grandaj konstruaĵoj rilate energion, trafikon kaj telekomunikon.

Konstruado de fundamentaj instalaĵoj preparis la vojon por disvolvo de Pudong, kaj serio da avantaĝaj politikoj de la ŝtato donis al Pudong pli grandan movforton. La investa medio de Pudong superis tiun de la marbordaj specialaj ekonomiaj distriktoj malfermitaj en la komenco de la 80-aj jaroj. Kaj en la flanko de investado Pudong estis pli fa-

La vendejoj sur la strato Wendeng



vore privilegiita. Ekzemple, Pudong permesas al eksterlandaj entreprenoj fondi ĉiovendejon, importi kaj eksporti en la liberko-

merca areo, fondi eksterkapitalan bankon... Tiuj privilegioj kaŭzis al Pudong mirindan disvolviĝon. Nun oficiale ekfunkciis





La loĝkvartalo Lujiazui


La komerca domo Pacifiko, la plej granda en Azio, en konstruado

La elektrejo Waigaoqiao konstruata



la kvar malgrandaj ekonomiaj regionoj la unuaj malfermitaj kaj fondiĝis kompanioj de ĉina-eksterlanda kapitalo.

En la du jaroj post la malfermiĝo de Pudong, formiĝis 1 233 projektoj de alilandaj kapitaloj, kun kontraktita kapitalo de 5.237



miliardoj da usonaj dolaroj, inter kiuj estis 2.653 miliardoj da usonaj dolaroj kiel ekstera kapitalo. Inter la sankciitaj projektoj de ekstera kapitalo, plejparto estis tiuj pri mikroelektroniko, kemiindustrio, farmacio, telekomunikado, aviado, preciza instrumento, mikrobo, aŭtopeco k.a. Internacie famaj translandaj kompanioj jam starigis filion en Pudong, ankaŭ pli ol 2 000 ĉinaj entreprenoj ekatentis Pudong kaj faris investon de la totala sumo de 11 miliardoj da juanoj, kaj la vendovaloro estis 30 miliardoj da juanoj. De januaro ĝis julio de 1993 la totala produktovaloro de la nacia ekonomio de Pudong superis 7.6 miliardojn da juanoj, je 42.8% pli multe ol tiu en la sama periodo de 1992, je 5 procentoj pli alte ol tiu de la tuturba meznombra kresko.

Kiel aspektos Pudong en 2000? Laŭ la plano de la 90-aj jaroj, Pudong kovros pli ol 100 kvadratajn kilometrojn, finiĝos la konstruado de la kvar ekspluatataj regionoj kaj la totala produktovaloro de la nacia ekonomio de Pudong atingos 50 miliardojn da juanoj. La ambiciaj Pudong-anoj decidis konstrui en Pudong fundamentajn instalaĵojn plej kompletajn en la lando, komercan

centron plej grandan en la lando, bazon de industrioj kun alta-nova teknologio kaj tiun de eksterakomerca prilaborado, liberkomercan regionon plej altgrade malfermitan en la lando, antaŭurban agrikulturon plej modernan en la lando kaj altkvalitan plansetlejon kun servo plej bona en la lando.

### REVIVIGI LA BRAVECON DE ŜANHAJO

Disvolvo de Pudong movis la disvolviĝon de la tuta Ŝanhajo. En 1992 Ŝanhajo investis 15 miliardojn da juanoj por la urba publika konstruado. Revivigo de la braveco de Ŝanhajo frontas unue kontraŭ la trogranda ŝuldo de la urba fundamenta konstruado kaj ties kateno al la ekonomia disvolviĝo. La malproksimvidaj ŝanhajanoj preskribis plurajn receptojn kontraŭ la seriozaj malsanoj kaj praktikis laŭ la receptoj per centoj da milionoj da juanoj. Sekve de tio aperis super Huangpu-rivero la pontoj Nanpu kaj Yangpu, en Pudong aperis la aŭtovojo Yanggao interliganta la kvar ekspluatatajn regionojn. Metroo estas konstruata. Laŭ plano oni konstruos duan metroon, trefkruciĝon en Pudong, eksteran ĉir-

kaŭurban vojon, fervojon en Pudong, supervojon en urbo kaj transriveran metroon. Dank' al tiuj konstruaĵoj Ŝanhajo paŝo post paŝo proksimiĝas al la vicaro de grandaj urboj en la mondo.

### PONTO AL LA MONDO

Disvolvo kaj konstruado de Pudong havigis al Ŝanhajo kaj ankaŭ al Ĉinio ponton al la mondo. Multaj ŝtataj entreprenoj utiligis la favorajn privilegiojn por Pudong kaj aktive serĉis eksterlande kunlaborantojn, por ke iliaj teknologio, administrado kaj la kvalito de produktaĵoj konformiĝu al la internacia avangarda nivelo. En 1992 ŝanhajaj industriaj entreprenoj enkondukis 1 600 projektojn de ekstera kapitalo, kiuj multe superis la totalan sumon en la antaŭaj 12 jaroj. Tiuj projektoj inkluzivas la ĉefajn industriajn fakojn de Ŝanhajo, ekzemple aŭtofabrikado, kemiindustrio, produktado de ŝtalo kaj elektra maŝino, ŝipkonstruado, telekomunikado k.a.


Malfermo de Pudong alportis revolucion al la scienc-teknika kampo de Ŝanhajo kaj kondukis ĝin sur la vojon de alta-nova teknologio. Dek grandaj rezervaj industrioj inkluzive de moderna biologia tekniko, kosmonaŭtika kaj aviada tekniko, moderna telekomunikado kaj nuklea utiligado estis difinitaj kiel gravaj planoj.

Sed tio, kio estas la plej taŭga por reprezenti la karakteron de Ŝanhajo, estas la provo de akcia sistemo kaj kulturado de diversspecaj merkatoj. Ĉio ĉi ludas avangardan rolon por la tuta lando.

Ŝanhajo situas ĉe la enfluejo de Yangzi-rivero. Tamen laŭ la konstruado de la Yangzi-rivera Ekonomia Koridoro, Ŝanhajo estas la kapo de la giganta drako. Ŝanhajo, la alte levita kapo de la drako, baldaŭ leviĝos en la aeron!

La laborejo Bopp, kiu produktas 3 600 tunojn da membrano jare





La memorhalo kun stupao de Bainqen Erdini la Deka

JI BAO:

## Inaŭguriĝis la memorhalo por Bainqen Erdini la Deka

**J**ANUARE de 1989, Bainqen Erdini la Deka, Bainqen Erdini Qoigyi Gyaicain (Banĉen Erdini Ĉojĝji Ĝjajcajn) veturis de Pekino al la Templo Zhashi Lunbo en Xigaze de Tibeto por prezidi la grandan ceremonion por inaŭguri la stupaon kaj memorhalon por Bainqen Erdini de la 5-a ĝis la 9-a. Sed pro akuta kormalsano, li forpasis la 28-an de la monato. La majstro Bainqen Erdini honesta kaj patriota, estis profunde amata de la tibeta popolo. Ĉiuj ĉinoj, inkluzive de tibetaj monaĥoj kaj laikoj, senescepte malĝojis pro lia forpaso. Tri tagojn post lia forpaso, la ĉina registaro decidis konstrui stupaon tegitan per ora lameno por la korpo de la majstro en la templo Zhashi Lunbo laŭ tibeta moro. Tiucele la ŝtato asignis 64.06 milionojn da juanoj, inkl. de 614 kg da oro kaj granda kvanto da arĝento kaj aliaj valoraj materialoj.

En Tibeto furoras diversaj sepultoj. La stupaa sepulto estas farita honore al tre prestiĝa viva budho kaj rigardata kiel la plej supera el ĉiuj sepultoj. La moro, laŭ kiu oni kultas la restaĵojn de viva budho en stupao, komenciĝis en la tempo de Ŝakjamunio (565-485 a.K.). Antaŭe, en diversaj dinastioj oni kultis ekskluzive la restaĵojn de Dalai-lamao en orlamene tegita stupao, sed tiujn de

Bainqen Erdini en arĝentlamena stupao. El tio videblas, ke la decido de la ĉina registaro plene spegulas la altan respekton de la ŝtato kaj la popolo al la majstro.

La memorhalo kun stupao de Bainqen Erdini la Deka estas inter tiu de la 5-a ĝis la 9-a Bainqen Erdini kaj la halo de la plej granda kupra budho Qiangba de Ĉinio. Antaŭ la stupao kaj memorhalo de Bainqen Erdini la Deka estas inter tiu de la 5-a ĝis la 9-a Bainqen Erdini kaj la halo de la plej granda kupra budho Qiangba de Ĉinio. Antaŭ la stupao kaj memorhalo de Bainqen Erdini la Deka estas inter tiu de la 5-a ĝis la 9-a Bainqen Erdini kaj la halo de la plej granda kupra budho Qiangba de Ĉinio. Antaŭ la stupao kaj memorhalo de Bainqen Erdini la Deka estas inter tiu de la 5-a ĝis la 9-a Bainqen Erdini kaj la halo de la plej granda kupra budho Qiangba de Ĉinio.

La 20-an de septembro 1990 komenciĝis la konstruado de la memorhalo. En la solena ceremonio por meti la bazŝtonon oni enterigis meze de la bazo "Feliĉigan Vazon" unu-metre altan, kun greno, trezoraĵoj, medikamentoj, tero, rokoj, ligno kaj akvo el diversaj sanktejoj de Tibeto ene. Sub la tero de la bazo oni enterigis ankaŭ pli ol 30 porcelanajn botelojn kun raraj objektoj, kio simbolas poreternan solidecon de la stupao.

La 16-an de aprilo 1991, oni komencis la konstruadon de la ĉefa parto de la memorhalo, la 23-jara ĉarpentisto Chilie Wangjiu (Ĉilje Ŭangĝjŭ) havis la honoron labori la unua. Oni don-

is al li la honoron pro tio, ke li aspektas bele, havas gepatrojn kaj portas la nomon bonaŭgur-an, Chilie Wangjiu (signifanta "sukceson en ĉio"). La laborantoj pene laboris tage kaj nokte kaj la 15-an de aŭgusto 1993 estis finkonstruitaj en la templo Zhashi Lunbo la ore brilantaj kaj majestaj stupao kaj memorhalo.

La memorhalo kovras 1 933 kvadratajn metrojn kaj altas 33.17 metrojn. ĜC havas la formon de la tradicia tibeta konstruaĵo. La tegmento de la memorhalo estas subtenata de kvar ŝtalbetonaj kolonoj tegitaj per ligno. La skulptaĵoj, freskoj, pordoj kaj fenestroj de la halo ĉiuj estas faritaj laŭ la tradicia teknologio. Ankaŭ la dimensioj estas prenitaj laŭ la tradicia sistemo. La botelforma stupao estas alta 11.52 metrojn, kun kvadrata soklo. La korpo de la stupao estas tegita per ora lameno, kun valoraj trezoroj inkrustitaj sur ili.

La 30-an de aŭgusto 1993 en la templo okazis ceremonio por ripozigi la restaĵon de la majstro. Ĝin partoprenis ĉ. 10 000 tibetaj monaĥoj kaj laikoj el diversaj rondoj. Je duono post la oka tiutage ok lamaoj elportis el Zijia(Žiĝja)-halo de la templo flavsatenan palankenon, en kiu kuŝis la korpo, kiu estis kultata tie kvar jarojn. Sur la 300-metra

(Daŭrigo sur p. 28)



SUR SCENEJO

# Vizaĝaj desegnoj en pekina opero

Fotoj de HUA MEI

La roloj en pekina opero estas dividitaj en kvin kategoriojn: ŝeng, dan, ĝing, mo kaj ĉjoŭ, ĉiu kun karakterizaj kostumo kaj vizaĝa desegno. Malsamaj kostumoj kaj malsamaj vizaĝaj desegnoj prezentas malsamajn kategoriojn de la roloj en la opero. Ĝenerale la ruĝa koloro signifas lojalecon kaj justamon, la blanka — ruzon kaj friponecon, la nigra — maldiskretecon kaj grandanimecon, la blua — firmvolecon kaj kuraĝon, la verda — neflekseblecon kaj malpaciencon, kaj la viola — netentebledon. La desegnoj de la roloj havas rutinon, kiun la aktoroj nepre devas observi.



de roloj



# Arbaroj atendas urĝan savon

**A**RBAROJ estas la ĉefa parto de la ekologia sistemo sur la tero. Antaŭ milionoj da jaroj du trionoj de la kontinentoj de la terglobo, t.e. 7.6 miliardoj da hektaroj, estis kovritaj de arbaroj. Sed nun la areo de arbaroj sur la terglobo draste malgrandiĝis, kaj restas nur tri miliardoj da hektaroj da arbaroj.

La tropikaj arbaroj konservas duonon de la specoj de la vivaĵoj de la mondo. Sed la arbaroj estis englutitaj dum longa tempo. Ĉiujare pereas 17 milionoj da hektaroj da tropikaj arbaroj en la mondo, kaj jam malaperis triono de la pluvarbaroj ĉe la ekvatoro.

Rapida kresko de loĝantaro de Azio kaj senbrida hakado senĉese forkonsumas la tieajn arbarojn. En 1991 la areo de arbaroj de Azio malgrandiĝis je

kvin milionoj da hektaroj, kvareble pli multe ol la perdkvanto antaŭ dek jaroj. La Grenaaĝrikultura Programo de UN montris, ke nun en Azio la nove kulturataj arboj estas nur dekono de la perdiĝintaj arboj. Specialistoj avertis, ke la terglobo baldaŭ perdos la aziajn arbarojn.

La stato de afrikaj arbaroj estas pli maltrankviliga. Pereis jam pli ol triono de la tropikaj arbaroj sude de Saharo. Malmultiĝas ankaŭ la arbaroj en la okcidento kaj oriento de Afriko. En iuj landoj, hakado kaj forbruligado englutadis la arbarojn, kio malmultigis pluvon, longigis la sekan sezonon kaj dezertigis multajn kampojn, kiuj antaŭe taŭgis por kulturo de kokaĵoj.

Detruigo de arbaroj serioze damaĝis la ekologian medion de la terglobo. Sciencistoj havis ko-

munan opinion, ke grandskala arbohakado estas la ĉefa kaŭzo de varmiĝo de la tera atmosfero. Detruigo de arbaroj pli kaj pli seriozigis la erozion, ke la tuta tero perdas ĉiujare 24 miliardojn da tunoj da grundo. Detruigo de arbaroj kaŭzis ankaŭ dezertiĝon de la grundo. Statistiko raportis, ke ĉiujare ses milionoj da hektaroj da tero dezertiĝis, kaj 64 landoj estas minacataj de dezertiĝo. 45 milionoj da kvadrataj kilometroj da tero jam dezertiĝis, kaj detruigo de tropikaj arbaroj minacas la ekziston de la 200 specoj da animaloj kaj 20 000 specoj da vegetaloj. Se la homaro ne alprenos kontraŭrimedon, pereos 10% de la vegetaloj kaj 20% de la animaloj ĉe la fino de la kuranta jarcento.

Por hejtado kaj kuirado la 2.2 miliardoj da homoj de la disvolviĝantaj landoj de la mondo forkonsumas ĉiujare 1.5 miliardojn da kubmetroj da ligno, nome duonon de la hakitaj arboj. Ankaŭ la eŭropa acida pluvo kaj incendio en la nordamerikaj arbaroj katastrofe minacis la mondajn arbarojn.

Por la homa morgaŭo, la tuta mondo frontas kontraŭ urĝan savon al la arbaroj. ■

*(Daŭrigo de p. 25)*

avenuo de la halo ĝis la memorhalo estis bonaŭguraj bildoj pentritaj el laterito kaj kalko. La ceremoniaj gvardianoj ambaŭflanke de la memorhalo sonigis klarionon kaj multaj religianoj, kun incenso kaj silkrubando en la manoj, preĝis al la restaĵo. La ceremonio daŭris du horojn. Post kiam dekoj da lamaoj recitis sutrojn kaj preĝis, oni metis la restaĵon de la majstro en la stupaon kaj tuj fermis ĝin. La patrino de la majstro veturis el sia hejmloko Qinghai speciale por partopreni

la ceremonion. Rigardinte la stupaon kaj la restaĵon de la majstro, la 77-jara maljunulino diris kun emocio: "Estas granda honoro por Bainqen Erdini konstrui por li orlamene tegitan stupaon. Mi elkore dankas la registaron."

La 4-an de septembro 1993 okazis en la templo Zhashi Lunbo la ceremonio por inaŭguri la stupaon kaj memorhalon de Bainqen Erdini la Deka. En la templo pendis buntaj sutro-flagoj kaj en la korto por sutrorecitejo staris 7-etaĝa turo. La solena ceremonio komenciĝis de sutro-

recitado far du eminentaj lamaoj akompanate de klarionado kaj tamburado. Ĝin partoprenis membroj de la Delegacio de Ĉina Registaro, pli ol 2 000 tibetaj monaĥoj kaj laikoj, kaj ankaŭ reprezentantoj el Sichuan, Qinghai, Gansu, Yunnan, Xinjiang (Ŝingĝang) kaj Interna Mongolio. Ĉiuj partoprenantoj alte taksis la patriotan spiriton de la majstro Bainqen Erdini, decidis daŭrigi lian aferon kaj diligente labori por unueco de la patrolando, unuigo de ĉiuj nacioj kaj nova Tibeto. ■



# La Televida Urbo en Ĉinio

Teksto de LI QIANG

Fotoj de LI CHUNGENG

**P**OST tri-jara konstruado, sude de Zhuozhou (Ĝuōgōu), Hebei-provinco, stariĝis nova urbo. Ĝi estas unu el la produktaj bazoj de la Centra Televida Stacio, la plej granda en Ĉinio. Malfermite, ĝi jam akceptis turistojn kaj filmistojn en kaj eksterlandajn.

Laŭdire, dum la periodo de Tri Regnoj (220-280), Liu Bei, estro de Shu-regno, kaj lia generalo Zhang Fei (Ĝang Fej) naskiĝis en Zhuozhou, kaj ili konatiĝis kun alia generalo Guan Yu en tiu loko. En persika ĝardeno la tri personoj fratece ligiĝis por ĉiam. Per ilia renkontiĝo komenciĝis la fama ĉina klasika romano "Rakontoj de Tri Regnoj".

La urbeto Han en la televida urbo konstruiĝis por filmado de la 80-parta televida filmo "Rakontoj de Tri Regnoj". Antaŭe oni elektis kaj konstruis provizoran filmejon de televida filmo diversprovinco, kio kaŭzis grandan malŝparon de mono, tempo kaj uzitaj konstruaĵoj zorge projektitaj de belartista por la filmo. Por ŝanĝi la situacion, ekde 1990 la Centra Televida Stacio investis por konstrui produktan bazon en Zhuozhou.


Pordo-turo staras sur la alta defendmuro de la urbeto Han, kie oni filmadis multajn atakajn spektaklojn en "Rakontoj de Tri Regnoj" kaj spektaklojn de Han-dinastio en aliaj televidaj filmoj. En la urbeto kuŝas tri stratoj, kiuj portas stilojn de Wei-, Wu- kaj Shu-regnoj. Ekz. la strato en stilo de Wu-regno similas al tiu en akvoriĉa regiono sude de Yangzi-rivero. Ligna ponto staras super kanalo laŭ la strato. Ligna ŝipo ripozas en la kanalo. Antaŭ filmado oni devas pumpi akvon de proksima rivereto en la sekan kanalon. Tiel oni kreas tipan stratan pejzaĝon ofte videblan en la akvoriĉa sudo. Laŭ la stilo de Tang-dinastio (618-907) oni starigis la urbeton Tang, kiu portas ĉefe nigran kaj grizan kolorojn same kiel la urbeto Han, sed la unua


estas pli grandioza ol la lasta. En ĝi altas pordoturo, larĝas strato, luksas palaco kaj modestas popolaj loĝdomoj. Tie naskiĝis pli ol dek filmoj kaj televidaj filmoj, inkl. la granda televida filmo "Li Longji" pri imperiestro de Tang-dinastio kaj la filmo "Yang Yuhuan" pri lia plej dorlotata kromedzino. Ankaŭ la televida filmo "Li Shimin" pri alia imperiestro de la dinastio filmiĝis tie. En la filmo la juna imperiestro Li Shimin svingadis glavon, sidante sur galopanta ĉevalo, kiel brava militisto.

Tie la loĝejo estas luksa: alta alero, granda ĉefhalo, elegantaj mebloj, zigzaga verando, belaj artefaritaj montetoj, verda herbaro. Ambaŭflanke de la strato staras butikoj unu apud alia kun diversaj ŝildoj, kiuj montras prosperon de la dinastio. Post la inaŭguro en la 5-a de septembro 1992 la Televida Urbo jam akceptis dekmilojn da turistoj.

La Televida Urbo konstruiĝis iom post iom laŭ la bezono de filmado. Oni konstruis la urbeton Tang pli frue ol la urbeton Han. Kiam la unua finkonstruiĝis, ankaŭ finiĝis la filmado de

En la urbeto Han





Strato en la urbeto Tang



Filmado en la urbeto Tang

la televida filmo "Li Longji". Nun la konstruado de la urbeto Han kaj la filmado de la televida filmo "Rakontoj de Tri Regnoj" iras samtempe.


En la Televida Urbo konstruiĝis ankaŭ luksaj hoteloj Taoyuan kaj Meiyuan en stiloj de Tang-kaj Qing-dinastioj por akcepti filmistojn kaj turistojn. La filmado-halo kun areo de 1 200 kvadrataj metroj, la plej granda en Azio, jam ekfunkciis. La konstruantoj de la urbo planas starigi pli multajn antikvecajn konstruaĵojn en tiu 200-hektara dezerto, ekz. tiuj de Song-dinastio (960-1279) kaj Yuan-dinastio (1271-1368), subakva truka filmejo kaj primora pitoreskejo de nacimalplimultoj. Antaŭvideble, la Televida Urbo pli kaj pli perfektigoj kaj allogos pli da homoj kiel bazo de filmo-produktado, galerio de antikva kulturo kaj turisma loko sur la ebenaĵo de norda Ĉinio ■





Parto de la Televida Urbo

Televida filmo farata





# Biciklo-riparisto

**D**E sezono al sezono, sur la stratoj de Pekino cirkulas aŭtobusoj, personaŭtoj kaj taksioj, krome, ankaŭ senfine fluas bicikloj.

Pekino, regno de bicikloj, jam havas pli ol naŭ milionojn da bicikloj. Se ĉiutage 1% de ili ne bone funkcias, tio signifas, ke 90 000 bicikloj devas esti riparitaj. Tial plimultiĝis sur stratoj biciklo-riparistoj. Iuj prenas la riparadon kiel sian duan profesion. S-ro Wang Zhihong (Ŭang Ĝihong) estas unu el ili.

Kiel maŝino-riparisto s-ro Wang vivas de nealta salajro. Li volas servi al aliaj per biciklo-riparado kaj gajni iom da mono per tio. Ĉiutage, tuj post sia la-

boro en la oficejo li biciklas kun ripariloj al movoplana vojkruciĝo. Li metas sian biciklon ĉe muro, apogas kartonan ŝildon al arbo, sur kiu skribiĝas la vorto "biciklo-riparado", kaj eklaboras. Komence li hontetis pro tio kaj laŭeble evitis la rigardon de siaj amikoj kaj kolegoj, sed iom post iom li alkutimiĝis al la laboro.

S-ro Wang riparas sub la libera ĉielo. Vintre li hejtas forneton apud si por sin varmigi, somere li ŝirmas sin sub arbo. Li estas forta kaj penema. En somero li laboras kun nuda torso. Li tre lertas en riparado. Por ripari ne multe difektitan biciklon li bezonas nur pli ol dek, kaj eĉ kelkajn minutojn. Li havas var-

man koron, tial multe da klientoj fariĝis liaj amikoj. Kiam ili haltas ĉe la riparejo, ili ŝatas babilu iomete kun li.

Ĉiufoje, kiam mi bicikle preteriris la riparejon, mi vidis, ke klientoj atendas lian servon. Iutage, pro scivolemo mi puŝis al li mian biciklon iom ne bone funkciantan.

"Ĉu ĝi ne bone iras?" li demandis min.

"La malantaŭa rado ne bone funkcias," mi respondis.

Tenante la apogilon de mia biciklo per la maldekstra mano kaj la selon per la dekstra, li turnis la malantaŭan radon. Poste, li diris: "La rado iom deformiĝis." Li kaŭriĝis kaj zorgeme reordigis dekojn da spoko de la rado. De tempo al tempo li turnis la radon kaj tuŝetis fojefoje la radrandon per la montra fingro por kontroli ĝian turniĝadon. Dek minutoj pasis, li kontente ekridetis, dirante: "Mi ĝin finriparis. Bonvolu pagi 0.8 juanon."

Mi elprenis unu juanon kaj donis ĝin al li. Anstataŭ ĝin akcepti, li fikse rigardis mian biciklon kaj diris: "Ankaŭ la apogilo ne bone sidas." Li reĝustigis ĝin, levis ŝraŭbturnilon de sur la tero kaj fiksis ŝraŭbojn de la biciklo. Fine li insistis redoni al mi 0.2 juanon.

Riparite, mia biciklo bone funkciis. Mi pensis, ke mi petos lian servon, kiam mia biciklo refoje perturbiĝos. Sed pro senmanka riparado ĝi bone funkciis

S-ro Wang Zhihong riparas biciklon.



sufiĉe longan tempon.

La grandaj biciklo-riparejoj en la urbo ĝenerale laboras de la 8-a matene ĝis la 5-a vespere. En la aliaj horoj nur tiaj biciklo-riparistoj, kia s-ro Wang, servas al biciklantoj. Multfoje li laboras ĝis la 8-a aŭ 9-a vespere.

Mi interparolis kun s-ro Wang kaj informiĝis, ke li havas 4-membran familion. Mi konsilis al li pli frue hejmeniri, por ke liaj edzino kaj infanoj ne maltrankviliĝu pri li.

“Ankaŭ miaj familianoj konsilis al mi, ke mi ne laboru multe, ĉar sola riparado ne riĉigas,” li diris ridetante, “sed, ankaŭ mi ĉiutage biciklas al la laboro, mi bone scias la malfac-

cilojn de biciklantoj. Kiel ĉaĝreniĝas biciklantoj, se ilia biciklo subite paneas nokte survoje. Tial mi volas laŭeble helpi ilin.” Ĉu vespere, ĉu nokte, li varme servas al ili, postulante moderan pagon.

Foje, mi hazarde aŭdis de li: “Damninda pluvo! Se mi ŝirmas min kontraŭ ĝi, do mi devas prokrasti la laboron; se ne, mi tramalsekiĝos. Tiam mia edzino certe riproĉos min, Ho ve! ĉu indas, se vi malsaniĝos de pluvo?” Iuvespere, pluvo estis falonta, kaj s-ro Wang pretis hejmeniri. Tiam iu mezaĝulo hastis al li kun biciklo, dirante: “Mi havas urĝan aferon. Bonvolu nepre helpi min.” Jam tondradis kaj fulmadis. S-ro Wang hezitis.

Sed, vidinte la helppetantan rigardon de la mezaĝulo, li tuj ekriparis la biciklon. Pluvego falis, sed li ankoraŭ riparadis. La pluvakvo tramalsekigis liajn vestojn. Riparinte la biciklon, li urĝis la mezaĝulon por ties urĝa afero, sen postuli monpagon. Reveninte hejmen, s-ro Wang ternadis. Kaj lin kulpigis la familianoj.

“Kiel bone estus, se mi ripozus 10-15 tagojn!” li diris al mi. “Sed pensante pri la klientoj, kiuj bezonas mian servon, mi neniam ĉesas labori. Mi tre ĝojas, ke mi povas iom kontribui al la socio per mia servo.”

Kvankam mi malofte kontaktiĝas kun li, tamen li donis al mi profundan impreson per sia diligenta kaj bonkoreco. ■

## Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de “El Popola Ĉinio” ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluantaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu abonni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprene mon kaj pardonon.


Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de “El Popola Ĉinio” kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monofere al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-


di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.



Bonefika termosoj



Lü Jiang en scienc-  
teknika ekspozicio

Lü Jiang (Lju Ĝiang), lernanto de alta klaso de la Pekina Huiwen-mezlernejo, estas karese nomata "juna inventisto". Antaŭ nelonge li estis elektita kiel landnivela "Elstara Lernanto", la plej alta honoro por ĉinaj lernantoj.




Ludo sur kegloluda  
tablo inventita de Lü  
Jiang



# Juna inventisto

Fotoj de LI CHUNGENG



Lü Jiang


Ekde la dua klaso en la elementa lernejo li faris unu aŭ du inventaĵojn ĉiujare kaj partoprenigis ilin en la konkurso en "Scienca Monato". Lia vigla kreiveco kaj akra observado senĉese inspiris lin en kreo de novaj verkoj. Lia inventaĵo

"bonefika termosoj" premiita en la Kvina Tutlanda Inventa Konkurso bone solvis la problemon de varmoperdiĝo pro korko. Lia infana keglado bezonas nur lignan ludejon en negranda ĉambro, kaj multiĝis la ludmanieroj. Li partoprenis en tutlanda faka projekta

konkurso por redukto de rompiĝo de vitroplato dum transportado, en kiu nur plenaĝuloj povis partopreni. Lia projekto estis elektita por apliko, kaj tiam li estis nur 13-jara. Li projektis pantoflojn lumantajn en nokto, por ke oni povu bone vidi ilin en mallumo. Li inventis ankaŭ kruĉon, kiu povas ŝparigi tempon kaj hejtaĵon, kaj roboto-ludilojn, dupiedan kaj kvarpiedan. Nun li estas cerbumanta pri reformado de iu maŝinpeco uzata kaj por aŭto kaj por aviadilo, opiniante, ke la malnova maŝinpeco ne konformas al la avangarda projekto de modernaj aŭtoj kaj aviadiloj.

Lü Jiang dediĉis jam dek jarojn al inventado kaj gajnis 14 scienc-teknikajn premiojn, inter kiuj 7 estis landnivelaj kaj pekinaj. Li spertis multajn malsukcesojn, sed multe lernis el ili.

Skemo de vitra pakumo



# *La higiena afero de la ĉina kamparo*

## LA SEVERAJ DEK JAROJ

En la lastaj dek jaroj de la 20-a jarcento Ĉinio rapidigas la higienan konstruon en la kamparo, por ke la sanstato kaj kuraca kaj sanitara servoj de la 900 milionoj da kamparanoj, kiuj konsistigas pli ol 80% de la ĉina loĝantaro, multe pliboniĝu kaj efektiviĝu la ĝenerala celo, ke en 2000 ĉiu kamparano en Ĉinio ĝuu sanprotektadon.

Tio estas grandioza kaj peniga projekto. En la pasintaj pli ol 40 jaroj post fondiĝo de la nova Ĉinio, por protekti la sanon de la kamparanoj, la ĉina registaro ellaboris serion da politikoj, oferis sufiĉe multe da laborfortoj, monrimedoj kaj materialoj, kaj, laŭ la ĉina cirkonstanco, starigis kamparan sanitaran servo-sistemon de kuraca, preventa kaj sanprotekta reto, kooperata kuracado kaj kulturado de vilaĝaj kuracistoj. Ĝi trovis vojon por disvolvi la kamparan higienan aferon kun ĉinaj karakteroj. Tamen, la 900 milionoj da kamparanoj ja estas granda nombro, kaj la kampara higiena afero ankoraŭ alfrontas severan situacion.

Nun la plej serioza problemoj estas malbonaj bazaj instalaĵoj. La kadukaj domoj de sanitarejoj de la distriktoj kaj urbetoj de la lando kovras pli ol 7 milionojn da kvadrataj metroj, kiuj konsistigas 12% de la totala areo de la higienaj konstruaĵoj. Nemalmultaj kuracejoj hodiaŭ daŭre laboras per ordinara instrumentoj, kiaj stetoskopo, arteria tensiometro kaj termometro. Al la guberniaj preventa kaj sanprotekta institucioj por virinoj kaj infanoj mankas bazaj kondiĉoj por disvolvi sian profesian laboron. Krome, pro reformado de la kampara ekonomia sistemo la antaŭa monkollekta rimedo por sanprotektado ŝanĝiĝis, kaj la novaj rimedoj kaj meĥanismo por efike kolekti sanitaran kapitalon ankoraŭ ne formiĝis, tiel ke ĉ. 1/3 de la sanitarejoj de la lando dronis en ekonomia malfacilo. Diferenco de la sanitara servonivelo inter la ekonomie disvolviĝintaj regionoj kaj malriĉaj regionoj daŭre grandiĝas. Ankoraŭ mankas kuracistoj kaj medikamentoj en la malriĉaj regionoj, la kamparanoj estas malforta en prevento kontraŭ malsanoj. Pli ol 60% de la malriĉaj kamparanaj familioj ne povas elteni la pagon


por malsano.

## NOVA STRATEGIA TRANSIRO

Antaŭ pli ol 20 jaroj la ĉina registaro prezentis la sloganon “meti la graviton de kuracado kaj higiena laboro sur la kamparon”, granda nombro da medicinaj laborantoj iris al la kamparo, kio ĝis nun estas laŭdata de la vastaj kamparanoj kaj kamparaj higienaj laborantoj. En la 90-aj jaroj la ĉina registaro denove emfazis, ke oni devas senprokraste turni la strategian graviton kaj investon por la higiena laboro al la kamparo kaj baza preventado kaj sanprotektado, pri tio la registaro alprenis serion da rimedoj kaj donis grandan atenton kaj esencan forton al la kampara higiena laboro. Sole en la lastaj du jaroj la centra registaro de la Ĉina Popola Respubliko jam investis ĉ. 100 milionojn da juanoj (5.8 juanoj = 1 usona dolaro), kiel specialan kapitalon, por la kamparaj kuraca kaj higiena aferoj. En 1992 surbaze de la kuna enketado, la Financa Ministerio kaj la Ministerio de Higieno de Ĉinio publikigis la dokumenton “Opinioj pri la problemoj por fortigi la kamparan higienan laboron”, kaj monpremiis la regionojn, kiuj bone faris la kamparan sanprotektadon.

Nun oni denove emfazas la principon “meti la sanprotektan strategian graviton sur la kamparon”, kiu havas pli esencan enhavon. La Ministerio de Higieno postulas, ke por strikte observi kaj efektiviĝi la ĝeneralan celon, ke “ĉiu ĝuu sanprotektadon”, oni devas fari ĉion eblan por plenumi la taskon, ke antaŭ 1995 ĉ. duono de la gubernioj de la lando plene realigu la primaran sanprotektadon kaj en 2000 formiĝu stabila kaj efika sanprotekta sistemo en la kamparo; samtempe kun tio, oni devas koncentri kapitalon, por arope reformi kaj konstrui fundamentajn higienajn instalaĵojn de la kamparo, por ke en 2000 proksimume 95% de la distriktaĵoj kaj urbetoj kuracejoj, guberniaj preventejoj kaj sanitarejoj por virinoj kaj infanoj de la lando ne estu en kadukaj domoj kaj havu necesajn ekipaĵojn kaj kompare altnivelajn kuracistojn.

Gvidate de la politikoj de la centra registaro, la



La kontraŭmedolita hospitalo funkciigata de la vilaĝa kuracisto Yang Wenxiu

lokaj registaroj, laŭ siaj propraj kondiĉoj, ellaboris koncernajn politikojn por disvolvi la kamparan higienan laboron. Tiel la strategia gravito de la higiena afero de Ĉinio iom post iom transiras de la urboj al la kamparo.

### LA “TRI KONSTRUOJ”

Pro novaj politikoj en malpli ol 3 jaroj en la malriĉa ĉina kamparo aperis en la higiena afero bona situacio, kiu ne vidiĝis en la pasintaj pli ol 40 jaroj. Ni prenu kiel ekzemplon la reformon kaj konstruadon de distriktaj kaj urbataj kuracejoj, guberniaj preventejoj kaj sanitarejoj por virinoj kaj infanoj (t.e. la “tri konstruoj”). En 1991-1992 en Ĉinio 7 300 higienaj institucioj estis rekonstruitaj. La riparitaj, rekonstruitaj kaj ekspansiigitaj higienaj establoj kovras ĉ. 5.1 milionojn da kvadrataj metroj. En la rekonstruitaj sanitara institucioj ne plu vidiĝas kadukaj domoj. Ili ekhavis normalajn kaj praktikajn aparatojn kaj ekipaĵojn. En 1992 la kapitaloj de la fakaj ekipaĵoj de la distriktaj kaj urbataj kuracejoj de la tuta lando plimultiĝis je 230 milionoj da juanoj ol tiuj en 1991, egale al 17.9% de la totala ekipaĵa kapitalo de la kuracejoj.

En la konstruo de la kampara higiena afero, la diversnivelaj registaroj kiel eble plej multe asignis monsumojn, kvankam ili mem havis financajn malfacilojn. Krom la speciala kapitalo, en 1992 la premia kapitalo por la kampara higieno investita de la ŝtato jam atingis 80 milionojn da juanoj, en 1993 ĝi superis 100 milionojn da juanoj. En la pasintaj du jaroj la monsumoj investitaj de diversnivelaj registaroj por la “tri konstruoj” superis 60% de la totala kapitalo laŭ la plano. Tiel granda investo de la registaroj estas nevidata en aliaj konstruaj projektoj de la kamparo en la lastaj jaroj.

Kuraĝigate de diversnivelaj registaroj, ankaŭ la kamparanoj kun granda fervoro partoprenas en la higiena konstruado. Ili faris sloganon: “Ĉiu be-



En kampara hospitalo

zonu, ĉiu ĝuu kaj ĉiu partoprenu la primaran sanprotektadon.” En multaj lokoj aperis la emociaj scenoj, ke la popolamasoj donacis siajn monon kaj konstrumaterialojn por konstrui la distriktan kaj urbetan kuracejon. La kamparanoj en la regiono Hengshui de Hebei-provinco bone diris: “Kiam ni havos kuracejon proksiman, ni elspezos multe malpli ol viziti malproksimajn grandajn hospitalojn.”

Ĉu gvidantoj de diversnivelaj registaroj kaj kuracistoj, ĉu ŝtatoficistoj kaj individuaj komercistoj, ĉu vilaĝaj entreprenoj kaj elmigrintaj ĉinoj, ĉiuj monhelpis la higienajn aferojn unu post alia. 51 entreprenistoj de Cizao-distrikto de Fujian-(Fuĝjan)-provinco en kelkaj tagoj kontribuis pli ol 300 000 juanojn al la distrikta kuracejo.

Reformado kaj konstruado de la higienaj institucioj ankaŭ akcelis plibonigon de la teknika servo en la kampara kuracado kaj sanprotektado. Multaj lokoj aktive ekipas la rekonstruitajn kuracejojn kaj kulturis por ili kuracajn laborantojn. En la du jaroj al la kuracejoj kaj preventaj kaj sanprotektaj institucioj estis senditaj sume pli ol 8 000 diplomitoj el universitato kaj teknika lernejo. En la lastaj tri jaroj 7 800 sanitara fakuloj iris al la kamparo kaj ludis tie pozitivan rolon en kulturado de talentuloj kaj faka konstruado. La Luluo-a Centra Kuracejo de Xingtai (Ŝingtaj) de Hebei rekonstruis la ambulatorian domon kaj ekipis ĝin per ultrasono B, elektrokardiografo ktp., sendis siajn 15 klinikistojn al aliaj lokoj por ilin progresigi. Ekde 1990 la kuracejo sukcese faris sume 1 500 operaciojn kaj fariĝis centra kuracejo en tiu loko.

Neeviteblas la malfaciloj en sanprotektado por la 900 milionoj da kamparanoj. Ĉinio, neriĉa en diversaj flankoj, faras kamparan sanprotektadon, la plej grandan en la mondo, la malfaciloj, mankoj kaj problemoj estas kompreneblaj. Ni kredas, ke dank’ al nia penado, la ĉina kampara higiena afero certe havos grandan progreson antaŭ la fino de la 20-a jarcento. ■



# Kiel liberiĝi de cerba laco?

**P**RO longa streĉa mensa laboro vi facile suferas de troa laciĝo de la cerbo, kies simptomoj estas malkoncentriĝo de atento, malpliigo de komprenpovo kaj evidenta reduktiĝo de labor-efiko. Por liberiĝi de la cerba laco kiel eble plej rapide kaj rehavi labor-energion, faru kabinetan gimnastikon kaj memmasaĝon laŭ jenaj metodoj:

## I. KABINETA GIMNASTIKO

(1) Sidu aŭ staru rekte. Turnu vian kapon dekstren, ĝis vi vidos vian dekstran ŝultron kaj sentos doloretan en la nuko. Eltenu la doloretan 3-5 sekundojn. Turnu vian kapon maldekstren en la sama maniero. Tion faru 10 fojojn.

(2) Staru rekte kun piedoj disetenditaj je ŝultrolarĝo. Turnu vian torson maldekstren kun talio kiel akso. Frapu vian ventron per viaj dekstraj antaŭbrako kaj mano kaj vian dorson per viaj maldekstraj antaŭbrako kaj mano. Turnu vian torson dekstren kaj faru frapadon en la sama maniero. Tion faru 10 fojojn.

(3) Staru kun piedoj disetenditaj je ŝultrolarĝo. Levu viajn brakojn ambaŭflanke de la korpo kun mankavoj supren kaj manpintoj unu kontraŭ la alia. Levu la manojn kiel eble plej alten kun



1. La akupunktura punkto *bajhuj*
2. La akupunktura punkto *fengĉi*
3. La akupunktura punkto *tajjang*

okuloj rigardantaj la fingrojn. Profunde spiru 3 fojojn kaj denove prenu la originan teniĝon. Tion faru 5-10 fojojn.

(4) Staru kun piedoj kunmetitaj kaj genuoj iom fleksitaj. Pre-

mu la genuojn per la manoj kaj turnu la genuojn maldekstren 10 fojojn kaj dekstren 10 fojojn.

(5) Staru rekte kun manoj ĉe la talio aŭ ĉe iu subtenilo. Levu la maldekstran piedon je 20 cm kaj etendu ĝin antaŭen. Levu la piedpinton kiel eble plej supren kaj iom forte malsuprenigu la kalkanon. Faru tion poste per la dekstra piedo. Faru la ekzercon 10 fojojn.

Tiu gimnastiko estas facila. Vi fariĝos vigla, se vi faros ĝin 20 minutojn ĉiutage en labor-paŭzo.

## II. MEMMASAĜO DE LA KAPO

Por ke via cerbo ne tro laciĝu, ripozu 10 minutojn post ĉiuhora laboro kaj faru memmasaĝon kiel jene:

Malstreĉu vian tutan korpon kun okuloj duonfermitaj. Spiru egalritme. Per fingroj premfrotu la akupunkturajn punktojn *tajjang*, *bajhuj* kaj *fengĉi* po ĉ. 2 minutojn. Tion faru ĉiutage 2-3 fojojn.

*Tajjang* estas je ĉ. 3 cm for de la brovektremo kaj ekstera okulangulo, *bajhuj* meze de la verto kaj *fengĉi* inter la sternumoklavikla muskolo kaj trapezo (Vd. la bildon). ■

## Atenton!

La adreso de nia plia peranto en Belgio estas:  
Librairie Grande Muraille, Galerie rue Ruysbroeck 5,  
1000 Bruxelles, Belgio.

La nova adreso de nia peranto en Danlando estas:  
Libroservo de DEA, p/a Wolfgang Kirschstein, Jylland  
Allé 11, 8000 Arbusc, Danlando.

# Utilo de salo

**S**ALO povas esti uzata kiel kondimento, kaj krom tio, kiujn aliajn utilojn ĝi havas en la ĉiutaga vivo?

Se vi trinkas iom da salakvo matene, tio estas utila por kuraci mallakson. Somere, se vi abunde ŝvitas, salakvo helpas vin en prevento de sunfrapo. Te-akvo kun salo estas utila por kvietigi soifon kaj kuraci laringiton. Atentu, ke ĉiutage vi prenu malpli ol 5 gramojn da salo, alie pli da salo malutilas al via sano.

Estas utile, ke suferantoj de konjunktivito aŭ trakomo lavas siajn okulojn kaj dermatozulojn banas sin en salakvo. Se vi suferas de ventra doloro pro malvarmo, fomentu la ventron per saketo plena de varma bakita salo por mildigi la doloron.

Por lavi senkolorigemajn vestojn, unue metu ilin en varmetan salakvon por kelkaj minutoj kaj lavu ilin post ilia elakviĝo kaj malvarmiĝo, tiam la vestoj fariĝas ne plu facile senkolorigemaj. Por lavi blankajn vestojn, unue lavu ilin en

akvo kun 5% da salo solvita en ĝi, kaj post tio lavu ilin en sapakvo, tiam la vestoj ne havas sur si flavetajn ŝvit-makulojn. Por lavi malpurajn meblojn, unue lavu ilin en salakvo kaj poste en varma akvo, tiam la mebloj fariĝas tre puraj.

Por lavi la harojn, unue lavu ilin en akvo kun 5% da salo solvita en ĝi kaj poste ŝampuu ilin, tiam la haroj fariĝas molaj kaj brilaj. Se vi metas ĵus plukitajn florojn en akvon kun iomete da salo, la floroj povas resti freŝaj en pluraj tagoj. ■

## SENTENCOJ DE FILOZOFOJ

### Kion diris Mengzi?

Mengzi (372-289 a.K.) estis heredanto de konfuceanismo. Li disvolvis la penson de Konfuceo "homamo de humana homo" en doktrinon de humana regado por propagandi humanecon. Li oponis kontraŭ milito kaj perforto kaj pledis por humana regado.

Prefere ne havi librojn ol blinde fidi je libroj.

La popolo estas pli grava ol la suvereno.

Malfacilo obstinigas, komforto mortigas.

Kulturu vin malsukcesinte, helpu la mondon sukcesinte.

Amu la familianojn kaj aliajn, kaj plie amu ĉion en la mondo.

Ne estu tentebla de riĉego kaj alta rango, nek deprimebla de malriĉeco kaj mizero, nek fleksebla de perforto kaj minaco.

Tro da ŝato de juveloj alportas danĝeron.

Kiu sin malestimas, tiun aliaj malestimas.

Kiu amas aliajn, tiun ĉiuj amas; kiu respektas aliajn, tiun ĉiuj respektas.

# Etiko de Konfuceo

de HOU JUELIANG

**I**U japana entreprenisto opinias, ke "Analekto de Konfuceo" kaj abako funkcias kiel magia armilo de entreprenado. Konfuceo (551-479 a.K.) estis edukisto de la antikva Ĉinio. Etiko estis unu el la gravaj partoj de la enhavo de "Analekto de Konfuceo". La tiel nomataj "Analekto de Konfuceo" kaj abako aludas la etikon de Konfuceo kaj la modernan entreprenadon respektive. En la unuaj tagoj post kiam la japanaj laboristoj komencis labori en entreprenado, oni instruas al ili la fidelecon al la entreprenado, kaj la gvidantoj de la entreprenado traktas siajn laboristojn ĝentile kaj ameme, por ke la lastaj amu la entreprenon kiel sian propran familion kaj diligente laboru. La japana entreprenisto diris, ke edifite ĝuste de la etiko de Konfuceo, li edukas siajn laboristojn, kaj pro tio la rilatoj inter kapitalistoj kaj laboristoj fariĝis intimaj kaj la tuta entreprenado funkcias en harmonio.

Konfuceo mortis jam antaŭ 2 000 jaroj. Tamen lia etiko ne perdis sian vivipovon kun la tempopaso. La etiko de Konfuceo konsistas el du partoj, t.e. la familia etiko kaj socia etiko.

La familia etiko de Konfuceo temas pri la homaj rilatoj interne de la familio. Per sanga intimeco ĝi akordigas la rilatojn inter la gepatroj kaj gefiloj, inter la gefratoj kaj inter la geedzoj. Laŭ lia etiko la gepatroj devas ami siajn gefilojn, dume la lastaj devas respekti kaj obei siajn gepatrojn. La pliaĝaj fratoj devas ami la mal-

pliaĝajn, dume la lastaj devas respekti la antaŭajn. La geedzoj devas respekti unu la alian kaj vivi intime.

En la familio la rilatoj inter la patro kaj filo estas la plej gravaj. En la jaroj, kiam vivis Konfuceo, multaj familioj estis malakordaj: La gefratoj traktis unu alian malamike, la geedzoj vivis neharmonie, kaj eĉ okazis foje, ke filo mortigis sian patron. Vizaĝe al la realo, ke sociaj moroj dekadencis tagon post tago kaj moraloj pli kaj pli malboniĝis, Konfuceo proponis al la tuta socio, ke oni devas respekti kaj obei siajn gepatrojn por akordigi la rilatojn inter la gepatroj kaj gefiloj.

En la okuloj de Konfuceo respekti kaj obei la gepatrojn estas bazo de la moraloj de la homo. Sen tio, li ne povas esti rigardata kiel nobla homo. Kion do signifas respekti kaj obei la gepatrojn? Laŭ Konfuceo, materie, la gefiloj devas kontentigi la gepatrojn en bezono de la vivo kaj zorgi pri ilia sanstato, kaj spirite, la gefiloj devas respekti kaj konsoli la gepatrojn. Tio estis moralaj principoj de Konfuceo. Por akordigi la rilatojn inter la gepatroj kaj gefiloj, Konfuceo akcentis respekton al la gepatroj. Li emfazis, ke la sola garantio de la vivbezonoj de la gepatroj ne diferencas de bredo de dombestoj.

Dum la pasintaj jarmiloj la ĉinoj observis tiun ĉi ĝeneralan moralan principon. Kiu tion malobeis, tiu estis riproĉita de la publiko.



Konfuceo

Tio tamen ne signifas, ke la gepatroj rajtas malbone trakti siajn gefilojn aŭ sklavigi ilin. Konfuceo opiniis, ke la gepatroj devas trakti siajn gefilojn kun bonkoreco kaj plena amo. Li opiniis, ke se la gepatroj estas malbonkoraj, do la gefiloj rajtas ilin ne respekti. La gepatroj kaj gefiloj estas egalaj je la homa digno. Kiam la gepatroj faris eraron, la gefiloj devas admoni ilin diskrete. Tiukaze la gefiloj ne devas malpacientiĝi. Se la gepatroj rifuzas la admonon, la gefiloj devas daŭre trakti ilin kun afableco.

Familio estas ĉelo de la socio. Ĉiuj socianoj vivas en sia familio kaj havas certan rilaton kun aliaj membroj de la familio. Sekve de tio, en la longtempa akordigo de la homaj rilatoj en la familio, ĉiuj familianoj estas edukitaj en la etiko kaj moraloj. Se ĉiuj socianoj observas la familian etikon, tio certe utilas al la socia kvieto kaj plialtigo de la nivelo de naciaj moraloj.

Disvolviĝinte pluen, la familia



etiko de Konfuceo fariĝis socia etiko por studi pri la homaj interrilatoj de la tuta socio.

Koncerne la regantaron, Konfuceo donis grandan atenton al akordigo de la rilatoj inter la suvereno kaj la subuloj. La suvereno estas plej aŭtoritata kaj rajtas fari ĉion, kion li volas. Konfuceo volis, ke la suvereno ne fariĝu tirano malamata de la tuta socio, sed saĝa reganto portanta feliĉon al la popolo. Li volis ankaŭ, ke la suvereno faru ĉion laŭ tradiciaj etikaj principoj, ĝentile traktu siajn subulojn, respektu la eminentajn korteganojn kaj akceptu iliajn proponojn. Rilate la korteganojn, Konfuceo deziris, ke ili estu lojalaj al la suvereno kaj bone faru ĉion, kion ili devas. Li deziris, ke kaj la suvereno kaj la oficistoj devas esti rigoraj al si mem. Li oponis kontraŭ ribelo, precipe mortigo de suvereno far oficistoj. Li staris por lojaleco al la suvereno kaj por ties aŭtoritateco. Li tamen malaprobis la blindan obeadon kaj senkondiĉan fidelecon. Li diris, ke oni devas esti lojala al la suvereno, ne trompi lin, tamen oni povas fari al li konsilon, spite lian koleradon. En la epoko, kiam vivis Konfuceo, ofte okazis batalo por regpotenco interne de la regantaro, kiu kaŭzis la socian tumulton kaj multe suferigis la popolanojn. Ĝuste por akordigi la rilatojn inter la suvereno kaj la subuloj kaj por la longdaŭra socia kvieto Konfuceo proponis sian tezon pri fideleco kaj etiko rilate la konduton de la suvereno kaj la subuloj.

La rilatoj inter la amikoj estas alia grava parto de la etiko. Koncerne tion, Konfuceo proponis, ke la amikoj devas konfidi unu alian. Li opiniis, ke perfidi sian promeson kaj trompi siajn amikojn estas ege malmorale. En liaj okuloj la konfideco estas plej grava por la homa konduto. Se la amikoj ĉiam tenas konfidecon, do la sociaj moroj fariĝos pli bonaj kaj la sociaj konfliktoj pli malmultaj.

Ĉu oni devas akordigi ankaŭ la rilatojn inter la malamikoj? Konfuceo opiniis, ke oni devas tion fari. Li opiniis, ke estas bone forgesi la malamamon, sed ne eksciti ĝin. Forgesante la malamamon, oni do ĉesigas la batalon. Se ne, la antaŭa malamo fariĝas pli akra. Kiel do forgesi la malamamon? Konfuceo opiniis, ke oni devas esti grandanima al siaj malamikoj, pardoni ilin kaj fari bonon al ili. Kvankam la malamikoj iam faris malbonon al vi, vi devas neglekti tion, tiel la antaŭa malamo fariĝos malakra. Se vi reagis kontraŭ tio, do la malamo fariĝos pli akra, kaj fine vi ambaŭ estos damaĝitaj. Konfuceo diris, ke oni ne devas trudi al aliaj tion, kion ili mem ne volas.


Koncerne la rilatojn kun aliaj, Konfuceo diris: "Se vi volas sukcesi en via afero, vi devas ankaŭ helpi aliajn sukcesi en sia afero. Se vi volas realigi vian idealon, vi devas ankaŭ helpi aliajn en realigo de sia idealo." Tio signifas, ke oni ne devas antaŭ ĉio zorgi pri si mem ekskluzive, sed ankaŭ zorgi pri aliaj. Por tiel konduki oni devas esti grandanima kaj bonkora. En la epoko, kiam vivis Konfuceo, al multaj homoj mankis bonkoreco, kaj ĉie vidiĝis subpremaĉado kaj ekspluatado de homo super homo. Por siaj propraj profitoj oni damaĝis aliajn kaj agis por atingi sian sukceson kaj nobeliĝon surbaze de alies suferado. Konfuceo propraokule vidis, kiel sklavoj estis mortigitaj kaj fariĝis viktimoj de aristokratoj. Li propraokule vidis ankaŭ, ke virino sin kaŝis en profunda monto por eviti imposton, dum ŝiaj bopatro, edzo kaj filo estis mortigitaj de tigroj en ĉasado. Vidante tiel sangajn kruelaĵojn, Konfuceo sentis triston. Li proponis "Estu humanaj!" kaj "Amu la tutan popolon!" Li rimarkigis, ke la natura memstareco de la homoj estas nenuligebla kaj devas esti alte taksata. Ĝuste pro la grandanima humaneco, Konfuceo povis prezenti al la socio metodojn akordigi la

homajn rilatojn. Li esperis, ke ĉiuj en la socio estos respektataj kaj havos belan perspektivon kaj feliĉon. Li esperis ankaŭ, ke ĉiuj estos humanaj.

Per sia etiko Konfuceo instruis, kiel konduki. Lia disĉiplo Zi Xia (Zi Ŝja) akceptis la ideon de sia majstro kaj fariĝis grandanima. Li proponis, ke ĉiuj en la mondo estu fratoj. Zi Lu, alia disĉiplo de Konfuceo, instruite per la tezo pri "humanismo", fariĝis tre malavara. Li diris: "Mi volas, ke miaj veturiloj kaj vestoj estu uzataj ankaŭ de miaj amikoj. Se ili estos eluzitaj, tion mi ne bedaŭros." Lia disĉiplo Zeng Zi akceptis lian etikon pri fideleco kaj konfideco kaj faris konstantan memkulturon. Li diris: "Ĉiutage mi plurfoje kontrolas min mem. Ĉu mi lojale helpis aliajn? Ĉu mi estis fidela al miaj amikoj? Ĉu mi relernis la hodiaŭan lernitaĵon?"

En la pasintaj jarmiloj la etiko de Konfuceo donis profundan influon al la tuta socio. En Ĉinio preskaŭ ĉiu loĝanto, ĉiu familio kaj ĉiu societo estas influitaj de lia etiko. Ĝi faras homojn ĝentilaj, intimaj kaj pacemaj kaj estigas grandan koaguliĝan forton de la socio. Pro tio la etiko de Konfuceo estis alte taksata de ĉiuj dinastioj de Ĉinio. Ĝi estas esenca parto de la ĉina kulturo kaj ludas aktivan rolon en la evoluo de la ĉina historio.

Mi tamen devas montri, ke la etiko de Konfuceo apartenas al la morala kategorio. Ĝia utilo por regado de la lando estas limigita. Multaj sociaj problemoj ne povas esti solvitaj per etikaj moraloj. Tiam oni devas solvi ilin per juĝrimedo. La feŭdaj regantoj de la ĉinaj dinastioj tion bone sciis kaj por regi la landon ili propagandis la etikon de Konfuceo, per kiu ili faris edukadon, sed efektive ili regis la landon per juĝrimedo en kombino de la konfuceanisma teorio kun la legalizista teorio. ■



La ŝtonkavernaro Longmen

HU YUN:

# 1994 — turisma jaro de Ĉinio

**K**IAM horloĝo batas nul horon de la nova jaro, Ĉinio prezentas antaŭ la monda publiko sian brilan antikvan kulturon, ke oni vojaĝu por ĝui ĝiajn historiajn restaĵojn en 1994. La vojaĝo rememorigos la turistojn pri malproksimaj jaroj.

En la pasintaj jaroj la turisma afero de Ĉinio evidente disvolviĝis. En 1992 Ĉinio sukcese aranĝis la Turisman Jaron kaj en la sekvanta jaro organizis la Vojaĝon por Viziti Pitoreskejojn, kiuj montris abundon da vidindejoj de nia lando kaj altiris al si multajn turistojn. Dank' al la vojaĝo oni pli bone konis Ĉinion kaj amikiĝis kun la ĉina popolo.

“Ĝuu historiajn restaĵojn de Ĉinio en la turisma jaro 1994” estas granda programo aranĝita kune de la ĉinaj turismaj servoj kaj departementoj pri historiaj restaĵoj por detale kaj koncentre

konigi al la mondo la historiajn restaĵojn kaj antikvan kulturon de Ĉinio, montri ĝin granda turisma lando kaj atentigi la ĉinan popolon pri protekto de la historiaj restaĵoj.

Ĉinio estas unu el la kvar civilizitaj antikvaj landoj. Ĝi havas historion de 5 000 jaroj. Sur tiu mirinda tero estas multe da antikvaj restaĵoj, kiaj la Granda Muro kaj Terakota Legio en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221 a.K. — 206 a.K.). Ĉio ĉi jam fariĝis neman-kigeblaj riĉfontoj por disvolvi la turisman aferon de Ĉinio.

Aŭtune de 1993 mi partoprenis la solenadon de la monda turisma tago en Henan-provinco kaj faris esploron pri tieaj historiaj restaĵoj. El tio mi profunde konis, ke dum la vojaĝo en Ĉinio oni certe povas ĝui belajn historiajn restaĵojn.

“En la malproksima oriento flugas drako, kies nomo estas Ĉinio; en la antikva Ĉinio fluas riv-

ero, kiu nomiĝas Flava Rivero...” Ĝuste kiel la kanto tekstas, la granda Flava Rivero nutris la brilan ĉinan kulturon kaj fariĝis lulilo de la ĉina nacio. La Flava Rivero trafluas Henan-provincon kaj faris ĝin miniaturo de la ĉina historio. Jam antaŭ 500 000-600 000 jaroj sur la tero de la hodiaŭa Henan-provinco vivis homoj. Oni trovis centojn da neolitikaj restaĵoj antaŭ 4 000-10 000 jaroj, kiaj la kulturoj de Peiligang, Yangshao kaj Longshan, kiuj bone montris la prosperon de la lasta periodo de la primitiva socio. De la 21-a jc. a.K., kiam regis Xia (Ŝja), la unua dinastio de la sklava socio, ĝis la Norda Song-dinastio (960-1127), kiam la feŭda socio de Ĉinio atingis la kulminon de sia prospero, 20 dinastioj starigis sian ĉefurbon en Henan. En la provinco estas tri antikvaj ĉefurboj, nome Anyang, Luoyang kaj Kaifeng, kie koncentriĝas multaj historiaj restaĵoj de la ĉina kulturo.

La nombro de la subteraj historiaj objektoj de Henan estas la plej granda en Ĉinio kaj tiu de la surteraj en tiu provinco okupas la duan lokon en nia lando. En la muzeoj de Henan konserviĝas 1.2 milionoj da historiaj objektoj, kiuj konsistigas okonon de tiuj de la tuta lando. Multaj el ili estas valoregaj. Kvankam mi restis en Henan nur kelkajn tagojn, tamen mi estis tre ravita de ĝiaj historiaj restaĵoj, malgraŭ ke mi vidis nur malgrandan parton de ili. En Zhengzhou (Ĝengĝoŭ), la ĉefurbon de la provinco, venis proksimume mil turistoj ĉinaj kaj alilandaj. Ili ĉiuj estis varme akceptitaj. La popolaj ensembloj el diversaj lokoj de la provinco prezentis programerojn. Iuj ludis gigantan drakon, kiu moviĝis jen supren, jen malsupren en la aero, aliaj dancis, vektoportante florajn korbojn por doni printempan etoson al aŭtuno, triaj en vestoj el ostoj kaj testuda ŝelo montris al la publiko la historion de la skribolingvo sur ostoj kaj testuda ŝelo, kvaraj kun brilanta kandelo sur la kapo dancis, postlasante gigantan ideogramon signifantan “Budho”... La turisma regiono de la Flava Rivero estas nove konstruita. Tie oni povas veturi per aer-kusena boato sur la vasta rivero. Tie la rivero eniras en sian mezan parton kaj fariĝis larĝa kaj la akvo fluas malrapide. Veturante en tiu parto, oni sentas la grandecon kaj patrinan teneron de la rivero. Alproksimiĝinte al rivermeza insuleto, oni alteriĝas, kvazaŭ sin ĵetante en la sinon de la patrino. Ĉio ĉi rememorigas la turistojn pri la malproksima antikveco. Mi ekpensis, ke iu el niaj legantoj deziris, ke nia revuo konigu la familiajn nomojn de ĉinoj. Mi volas diri al li, ke li scios

multon pri tio, se li vizitos Henan-provincon, ĉar Ĉinio originis ĉe la Flava Rivero. En nia lando 105 familiaj nomoj originis en Henan.

Kiam mi restis en Zhengzhou, mi vizitis la unuan budhisman templon de Ĉinio — Shaolin-templon en la gubernio Dengfeng. Tie originis Chan-sekto de la ĉina budhismo kaj Shaolin-skolo de la luktarto ŭŝu-o. Tie vidiĝas 240 pagoj el brikoj kaj ŝtonoj konstruitaj en Tang-dinastio (618-907) kaj postaj dinastioj, kiuj formis la plej grandan antikvan pagodaron de Ĉinio. Tie plej alloga estas rigardo de prezentado de ŭŝu-o far bonzoj de la templo Shaolin. Forlasinte Zhengzhou, ni daŭrigis nian vojaĝon al Kaifeng kaj Luoyang. En Kaifeng la historiaj restaĵoj estis postlasitaj plejparte de Song-dinastio (960-1279), kaj en Luoyang konserviĝas elstaraj objektoj de ĉiuj dinastioj de Ĉinio. Luoyang funkciis kiel ĉefurbo de pluraj dinastioj. Tie kuŝas la fama ŝtonkavernaro Longmen kaj la templo Baima, la unua budhisma templo starigita de la ŝtato, kaj la Muzeo de Antikvaj Tomboj, la plej granda en la lando. Ĉinio dediĉas grandan atenton al protekto kaj riparo de amasego da tieaj historiaj restaĵoj. La ŝtonkavernaro Longmen ĉe Yishui-rivero estis ekkonstruita en la jaro 488. Rigardante la riveron, la ŝtonaj budhostatuoj grandaj kaj malgrandaj ĉiam tenas majestan mienon. Bedaŭrinde, iuj el ili jam komencis eroziigi. Por protekti ilin, koncernaj departementoj de la urbo alprenis multajn rimedojn, kiaj firmigo de la montoj kaj translokado de la proksimaj fervojoj. Por tiu afero estas bezonata granda monsumo, kompreneble tio estas malfacile solvebla problemo por la urbo kaj por nia lando, tamen Ĉinio faris grandan klopodon. Oni prezentis la sloganon “Protektu la historiajn restaĵojn kaj akcelu la turisman disvolviĝon.” Mi kredas, ke en la estonteco tiu laboro estos farata certe pli bone.

La turisma jaro 1994 jam komenciĝis. Ĉinio preparis 14 itinerojn kun Xi’an (Ŝji’an), Luoyang kaj Nankino kiel centro. Ĉinio preparis ankaŭ enhavoriĉajn programojn por turistoj, kiuj povas vojaĝi laŭ la vojo irita de Konfuceo dum lia vojaĝo al multaj regnoj en la periodo Printempo kaj Aŭtuno, laŭ la vojo irita de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiam li vojaĝis orienten, kaj laŭ la vojo irita de Ĝingis Ĥano dum lia militiro kaj laŭ la vojo, laŭ kiu Marko Polo vojaĝis en Ĉinio. Ni kun etenditaj brakoj bonvenigas turistojn el ĉiuj partoj de la mondo. ■




# Roko-grimpado

Fotoj de YU LIANGMO



Grimpo sur natura rokmuro




Grimpo sur artefarita rokmuro

Roko-grimpado originis en Eŭropo en la 50-aj jaroj kiel branĉo de alpismo. En 1974 ĝi venis en mondan konkurson. Oni plejofte prenas naturan rokon kiel konkursejon.

En la 80-aj jaroj roko-grimpado vekis pli da intereso ĉe multaj homoj. En 1985 oni okazigis en Italio la Unuan Konkurson de Roko-grimpado. En 1989 okazis periode en Francio, Britio, Hispanio, Italio, Bulgario kaj Sovetunio la Unua Mondpokala Konkurso. En 1992 okazis en la Respubliko de Koreio la Unua Azia Konkurso de Roko-grimpado. Nun Ĉinio estas sin preparanta por gastigi la Duan Azian Konkurson de Roko-grimpado.

Roko-grimpado kunfandis sporton, amuzon kaj konkurson kaj kulturis en partoprenantoj kuraĝon, persistemon kaj neflekseblecon. Tiu sporto startis malfrue en Ĉinio, sed multaj homoj jam montris grandan intereson por ĝi. Nun Ĉinio havas du artefaritajn rokomurojn, unu en antaŭurbo de Pekino kaj la alian en Changchun.



Itala grimpisto (maldekstre) antaŭ konkurso

Grimpo sur urbomuro de Xi'an







Ma Junren (la dua de dekstre) kaj liaj sportistinoj

XIAO NAN:

## “Armeo de la Familio Ma” en la ĉina atletiko

**E**N la Sepa Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio, okazinta septembre de 1993, la elstaraj atingoj akiritaj de Liaoning-aj sportistinoj en la mez- kaj longdistancaj kuroj estis plej laŭdataj. Ili gajnis tri orajn, unu arĝentan kaj unu kupran medalojn en la Monda Atletika Ĉampionea Konkurso okazinta antaŭ nelonge. En la Sepa Tutlanda Sportkunveno ili ne nur gajnis la ĉampionecon de la 800-, 1 500-, 3 000- kaj 10 000-metraj virinaj kuroj kaj tiun de maratono, sed ankaŭ renovigis mondan rekordon de la 1 500-, 3 000- kaj 10 000-metraj virinaj kuroj. Ili skribis brilan paĝon en la sporta historio de Ĉinio kaj tiu de la mondo.

Ili vigligis la atletikan stadionon per sia kuraĝa lukto. Eĉ iuj alilandaj raportistoj venis unu post alia por intervjuo. Kiel do leviĝis la “virina taĉmento”? Mi konigu tion de la komenco.

### MIRIGA DIRO DE TREJNISTO MA

En la Kvara Monda Atletika Ĉampionea Konkurso, okazigita en la lasta aŭgusto en Stutgarto de Germanio, la ĉinaj sportistinoj Liu Dong, Qu Yunxia (Ĉju Junŝja) kaj Wang Junxia (Ŭang Ĝjunŝja) gajnis la ĉampionecon de la 1 500-, 3 000- kaj 10 000-metraj virinaj kuroj respektive kaj per tio finis la historion, en kiu ĉinaj sportistoj neniam gajnis oran medalon en la monda atletika konkurso.

En la raportista akcepto de tiu konkurso trejnisto Ma Junren (Ma Ĝjunfen) de la supre menciitaj tri sportistinoj eldiris mirigajn vortojn: “En la Sepa Tutlanda Sportkunveno niaj teamanoj ne nur gajnos orajn medalojn, sed ankaŭ rompos mondajn rekordojn.” Ankaŭ la 20-jara Wang Junxia diris: “Mi volus fariĝi la unua virino en la mondo, kiu povas kuri 10 000 m en malpli ol 30 minutoj.” En tiu ĉampionea konkurso ŝi per 30’49”30 rompis la azian rekordon kaj la rekordon de la Monda Atletika

Ĉampionea Konkurso. Ŝi jam proksimiĝis al la monda rekordo, kiun kreis norvega sportistino Kristiansen per 30’13”74 antaŭ sep jaroj.

Pasis nur duonmonato, la 8-an de septembro, en la Sepa Tutlanda Sportkunveno Wang Junxia renovigis la mondan rekordon per 29’31”78 en la finalo de la 10 000-metra virina kuro kaj realigis sian aspiron. En la konkurso ankaŭ la 26-jara Zhong Huandi (Ĝong Hūandi) el Yunnan, kiu antaŭkuris je pli ol 700 m, rompis la mondan rekordon per 30’13”37.

La 12-an de septembro kvin sportistinoj el Liaoning rompis la mondan rekordon de 8’22”62 en la 3 000-metra virina kuro. La sekvan tagon, en la finalo Wang Junxia kaj Qu Yunxia denove rompis la mondan rekordon kreitan en la lasta tago. Wang Junxia gajnis la ĉampionecon per 8’6”.

### “NE ĈIAM POSTIĜINTAJ ĈINAJ SPORTISTOJ”

Ne estis hazarde, ke la ĉinaj sportistinoj akiris grandan sukceson en atletiko, kaj ilia vojo ne estis ĉiam glata. Ne estas senutile retrorigardi la karieron de la ĉinaj atletoj en la batalo por kuratingi kaj superi mondajn nivelojn.

La 17-an de novembro 1957 sportistino Zheng Fengrong (Ĝeng Fengĵong) de Shandong-provinco de Ĉinio rompis la mondan rekordon de la virina altosalto per 1.77 m, kreitan de la usona sportistino McDaniel per 1.76 m. En la sama tago la Agentejo de Reuters raportis: “La 20-jara ĉina knabino per forta salto deklaris al la mondo, ke ĉinaj sportistoj ne ĉiam estas postiĝintaj.”

Ekde tiam, ĉinaj sportistoj plurfoje rompis mondan rekordon aŭ kreis mondnivelan atingon en la konkursoj de viraj altosalto, trisalto kaj longosalto kaj virina altosalto. En la lastaj jaroj ĉinaj sportistinoj jam enviciĝis inter la elstaraj sportistinoj de glob-, disko- kaj lanco-ĵeto, tamen en kur-konkurso



ĉinaj sportistoj ne progresis rapide dum longa tempo. Do iuj suspektis, ke tion kaŭzis la raso de ĉinoj. La respondo estis nea, ĉar en 1976 fama mallongdistanca sportistino Ji Zheng (Ĝji Ĝeng) de Taibej, Ĉinio, kiu estis trejnata en Usono, gajnis la kupran medalon en la 80-metra virina barierkuro en la 21-aj Olimpiaj Ludoj.

En 1990 ĉina sportisto Li Tong, kiu persistis en postlabora trejniĝado en Usono, partoprenis la finalon de la 110-metra vira barierkuro de la Tria Monda Atletika Ĉampioneca Konkurso en Tokio kaj gajnis la 8-an lokon.

Videble, la ŝlosilo kuŝas en trejnado. Ĉu ĉinaj trejnistoj povas elkulturi mondnivelajn sportistojn? En la lastaj jaroj iuj ĉinaj atletikaj trejnistoj, ĉerpante alilandajn spertojn, peneme serĉadis sian vojon kaj senĉese progresis.

En 1990 ĉinaj sportistinoj gajnis ĉiujn orajn medalojn de la 400-, 800-, 1 500-, 3 000- kaj 10 000-metraj virinaj kuroj kaj tiun de maratono en la 11-a Azia Sportkunveno. La ĉampionino de la 3 000- kaj 10 000-metraj virinaj kuroj estis Zhong Huandi, kiu ricevis trejnadon sur la oksigen-manka altebenaĵo de Yunnan-provinco.

En la 25-aj Olimpiaj Ludoj en Barcelono en 1992 Qu Yunxia, trejnita sur la altebenaĵo de Qinghai, gajnis la 3-an lokon de la 1 500-metra virina kuro.

Aprile de 1993, Wang Junxia atingis elstaran sukceson per 2:24'07" en la maratona konkurso okazinta antaŭ la Sepa Tutlanda Sportkunveno, pli rapide je 8'34" ol la ĉampionino de la Barcelonaj Olimpikoj. Aŭguste, la ĉinaj sportistinoj rikoltis bonan sukceson en Stutgarto; septembre, ili atingis pli altan nivelon en la Sepa Tutlanda Sportkunveno.

Nun, la ĉinaj sportistoj povas fiere diri, ke ili ne ĉiam estas postĝintaj en atletiko.

## "MISTERO" DE LA "ARMEO DE LA FAMILIO MA"

Ĉu estas "mistero" en la trejnado fare de Ma Junren?

Kiel oni vidas, Ma Junren trejnas nur kuradon. Tamen liaj teamanoj devas ĉiutage kuri la tutan maratonan distancon de 42.195 km, kio estas senprecedenca en la mondo. Jen kial ili, kurinte 10 000 metrojn, ne sentas grandan lacon, kiel ordinara sportistinoj. Iu japana ĵurnalo raportis la konkurson kun la titolo "Rigardado al 10 000-metra kuro ŝajne al la 800-metra".

Ma Junren ektrejnis la virinan teamon pri mez-kaj longdistancaj kuroj en 1988. Li gvidas la "Armeon de la Familio Ma" el 17 kamparaj knabinoj. Ili ne timas penigan trejnadon. Ma elektas sportistinojn ne nur laŭ ilia sukceso, sed ankaŭ laŭ ilia latenteco. La de li elektitaj sportistinoj Qu Yunxia, Wang Junxia kaj Liu Dong estis nur duaklasaj spor-

tistinoj en loka sporta lernejo aŭ sporta teamo. Surbaze de la aĝo, klereco, stato de familio, fiziologia indico kaj teknika supereco de sportistinoj, li ellaboris malsamajn projektojn kaj donis instruadon laŭ malsamaj personoj kaj tempoj. En kontrolado de sportopovo kaj senlaciigo li havis sian originalan teknikon, ke la sportistinoj ĉiutage kuris la distancon de maratono kaj ne sentis trolaciĝon. En esplorado de la scienca leĝo pri oksigenmanka trejnado sur altebenaĵo, ĉerpante alies spertojn, li faris sian propran provadon. Surbaze de alterna trejnado sur ebenaĵo kaj altebenaĵo li trovis fojojn taŭgajn por altebenaĵa trejnado kaj bone sciis, en kia fiziologia punkto la sportistinoj povas gajni neatenditan sukceson en konkurso. Li estis ekstreme rigora al siaj teamanoj.

Severa instruisto elkulturas eminentajn lernantojn. Dank' al la scienca elektado kaj trejnado, rigora administrado kaj racia distribuado de natura nutraĵo, la "Armeo de la Familio Ma" atingis eksterordinaran sukceson. Laŭ fakuloj, por elkulturi mondnivelan mez- kaj longdistanc-kuran sportistinojn oni bezonas 8-10 jarojn, sed Ma Junren mallongigis la tempodaŭron je 3-5 jaroj.

La apero de la "Armeo de la Familio Ma" markas la komenciĝon de la nova epoko de la ĉina atletiko.

# HEROLDO

## DE ESPERANTO

### LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 73 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikaj, librecoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝakproblemoj, foto-filmo

Jarabono 900 bfr., 45 gmk., 26 US\$ aŭ egalvaloro

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (50,00 guldenoj; por Nederlando 53,00 gld.)


Aparta aldono por aersendado

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: Via Natale Sandre 15, I-10078 Venaria R. (TO), Italujo; telekopilo (11) 226 30 78

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

### EKONOMIO

● En la lastaj jaroj de la nuna jarcento Ĉinio rapidigos fervojan konstruadon, rekonstruos la malnovajn fervojojn per avangarda tekniko kaj dizelizos, elektrizos kaj pezŝarĝos la gravajn fervojojn. En 2000 la totala longo de la fervojoj de la lando atingos 70 000 km.



Sur la olekampo Suizhong n-ro 36-1

● La olekampo Suizhong (Sujĝong) n-ro 36-1, la plej granda olekampo trovita en ĉina maro, jam komencis produktadon. Ĝi, kun oledona areo de 24 kvadrataj kilometroj kaj totala rezervokvanto de 250 milionoj da tunoj, situas en la maro apud nordorienta Ĉinio.

● Konstruado de metroo komenciĝis malfrue en Ĉinio. Nun la totala longo de la metrooj konstruitaj en Pekino, Tianjin (Tjanĝin) kaj Ŝanhajo estas sume pli ol 50 km.

Nun, en Tianjin kaj Ŝanhajo oni konstruas novajn metroojn, kaj ankaŭ Kantono, Shenzhen (Ŝenĝen), Chongqing (Ĉongĉing), Nankino, Qingdao (Ĉingdaŭ) kaj Shenyang (Ŝenĝang) komencos la konstruadon de metrooj.

● La generatoraro n-ro 1 de la Nuklea Elektrejo

de Dayawan (Dajaŭan) de Guangdong-provinco, la plej granda de Ĉinio tiuspece, ekproduktis elektron en la fino de aŭgusto 1992, kun generatora kapacito de 45 000 kilovattoj. Post ekfunkciado de la du generatoraroj la jara produktokvanto de elektro atingos 10-12.6 miliardojn da kWh.


● Lastatempe finiĝis la kontrolo de la 1 260-kilometra fotokablo sub la maro inter Ĉinio kaj Japanio. La nomita fotokablo estis konstruita kune de Ĉinio, Japanio kaj Usono. Ĝia komunika kapacito estas 16-oble pli granda ol tiu de la kablo konstruita en 1976 sub la maro inter Ĉinio kaj Japanio. Ĝi, altrapida kaj grandkapacita, estas la plej avangarda en la 90-aj jaroj en la mondo. Ĝi interligos la longdistancan komunikan reton de Ĉinio kun la fotokabla sistemo de la mondo, kio multe plifortigos la komunikan povon de Ĉinio.

● Yangpu-pontego super Huangpu-rivero de Ŝanhajo ekfunkciis oktobre de 1993. La pontego longas je 7 658 m kaj ĝia ĉefa parto longas 1 176 m, kun spano de 602 m. Ĝi estas staja ponto kun plej granda spano en la mondo.

● Nun en Ĉinio estas pli ol 2 000 ŝtataj farmejoj kun 4.407 milionoj da hektaroj da kampoj. La reformado farita en la pasintaj 15 jaroj mobilizis la aktivecon de laborantoj de la farmejoj. La kultivejoj kaj farmejoj fariĝis bazlokoj de agrikulturaj komercaĵoj, eksportaĵoj kaj flankmanĝaĵoj por urboj, fabrikoj kaj minejoj. La kampoj de la ŝtataj farmejoj konsistigas nur 4% de tiuj de la lando, tamen la greno donita de ili al la ŝtato konsistigas 10% de la mendita greno de la lando, la produktokvanto de kruda kaŭĉuko — 90% de tiu de la lando kaj la kvanto de eksportitaj sojfaboj — 31% de tiu de la lando.

● Por plie ŝanĝi la postigintecon de bazaj instalaĵoj en la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj akceli la disvolviĝon de la tibeta ekonomio, en 1993 la ĉina registaro asignis 977 milionojn da juanoj (5.8 juanoj = 1 usona

La generatoraro n-ro 1 de la Nuklea Elektrejo de Dayawan



dolaro) por ĝia baza konstruado. En la pasintaj 42 jaroj la totala sumo de investo jam superis 20 miliardojn da juanoj.

Nun, la konstruado de la akvopumpa kaj energi-konserva elektrejo Yanghu, la Ŝoseoj Qinghai-Tibeta, Sichuan-Tibeta kaj Ĉina-Nepala, la aerodromo Gongga kaj aliaj 9 gravaj projektoj iras glate.

● La pokapa loĝareo de ĉinoj kreskis de 4.3 kvadrataj metroj antaŭ dek jaroj al la nunaj 7.9 kvadrataj metroj. En la lando la publikaj domoj kovras ĉ. tri miliardojn da kvadrataj metroj. La kresko de loĝdomoj jam superis tiun de loĝantaro.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La Ĝenerala Ĉina Industria Kompanio Changcheng lanĉos por usona kompanio plurajn malaltorbitajn satelitojn "Yixing (Jiŝing)" per la transporta raketo "Changzheng 2-c". Laŭ la interkonsento, en 1996-2002 la kompanio servos al Usono per pluraj lanĉoj, ĉiu po du satelitoj.

### KULTURO

● Ekde 1987, sur la ĉeftero de Ĉinio laboras sume 614 televidioj, 33 130 televidaj sendostacioj kaj transsendaj stacioj, 49 544 km da mikroondaj lineoj por transsendi televidon kaj 41 469 surteraj satelitaj stacioj.

Nun, la loĝantoj de la tuta lando havas 230 milionojn da televidiloj, kaj pli ol 800 milionoj da loĝantoj, t.e. 81.3% de la tuta loĝantaro, rigardas televidon. Ĉinio estas lando kun plej multe da televid-rigarantoj en la mondo.

● Memore al la unua datreveno de la starigo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj la Respubliko de Koreio, invitive la Nacia Artista Trupo de la Respubliko de Koreio, granda ŝtata grupo de kanto kaj danco, unuafoje sendita de la registaro de la respubliko, vizitis Ĉinion kaj prezentis tradiciajn palacajn kaj popolajn

La Nacia Artista Trupo de la Respubliko de Koreio en prezentado



muzikojn kaj dancojn.

### MEDICINO

● La hormono, kiu povas altiĝi nanon aŭ normalan homon sub la aĝo de 23 jaroj je 5 cm en duonjaro, lastatempe estis elfarita de Nankai-universitato de Tianjin kaj ekspertizita de la ŝtato.

Laŭ informo, oni kondukis kreskigan genon en la homa hipofizo en ĝian kernan ĉelon por ĝin kulturi kaj ekstraktis la hormonon per bioinĝenieria tekniko. La esploro, plenumita de prof. Li Jianmin (Li Ĝjanmin), Zhao Dajian (Ĝaŭ Daĝjan) k.a., ne nur rompis la monopoligon de iuj landoj super altteknikaj produktaĵoj, sed ankaŭ donis kondiĉon por malaltiĝi la produktokoston kaj produkti la hormonon.

### TURISMO

● Nantian-farmejo en la antaŭurbo de Sanya de Hainan-provinco situas en la loko, kie estas la vidindejo Yawan(Jaŭan), honorita per "La Orienta Havaĵo", kaj la fama vidindejo "Terkapo de la Mondo". En la lastaj jaroj tie oni ekspluatis subterajn termofontojn kaj elfosis fonton kun taga ŝpruckvanto de 3 800 tunoj da akvo. Ĝi, kun temperaturo de 56.5°C, taŭgas por bano. La loko servas kiel turisma punkto de Hainan-provinco kaj estas atentata de transmaraj investantoj.

● Pro siaj grandiozaj historiaj restaĵoj la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.) estas laŭdata kaj esplorata de fakuloj en- kaj eksterlandaj. Precipe tio, ke oni elfosis el ĝi argilajn militistojn kaj ĉevalojn antaŭ dek jaroj, misterumis la imperiestran maŭzoleon konstruitan de 700 000 popolanoj.

Antaŭ nelonge, la konstruado de kastelo kun plankareo de 4 000 kvadrataj metroj, farita en modernaj rimedoj kaj imite al la subtera palaco de la nomita maŭzoleo, finiĝis post dek jaroj, kio vekis grandan intereson ĉe turistoj en- kaj eksterlandaj.

### SOCIO

● De januaro ĝis julio de 1993 Ĉinio esploris sume 95 kazojn de subaĉeto kaj prifraŭdo de publika mono, ĉiu kun monsumo de minimume miliono da juanoj, duoble pli multe ol tiuj en la sama periodo de 1992. Inter la subaĉetitoj kaj aliaj ekonomiaj krimuloj la nombro de kadroj de partiaj kaj registaraj instancoj estis pli granda ol antaŭe. El ili estis ankaŭ gvidantoj.

Oficisto de la Supera Popola Prokurorejo de Ĉinio malkaŝis, ke nun malversacio kaj subaĉeto estas pli seriozaj ol iam ajn post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Jam estas tempo forte ataki ilin.

Iuj krimuloj, kiuj malversaciis kaj prifraŭdis grandan monsumon, estas severe punitaj laŭ la leĝo.





S-ro Bai Dacheng faranta harfiguron

# Pekinaj harfiguroj

de LI QIANG

**H**ARFIGURO estas tradicia pekina metiartaĵo kun historio de pli ol 100 jaroj. Ĝi estis kreita de fama metiartisto Wang Chunpei en la fino de la 19-a jarcento.

Harfiguro estas imitita laŭ militista figuro de pekina opero. Generale, ĝi altas je 10 centimetroj kaj la plej alta je 70 centimetroj. La harfiguroj en operaj kostumoj portas sur la kapo diversajn ĉapojn, birdvostajn plumojn kaj flagojn surdorse, kun la vizaĝo bunte ŝmirita kaj imitita laŭ tiu de rolo de pekina opero kaj malsamaj armiloj en la manoj. Kiam oni metas harfigurojn sur latunan teleron aŭ gongon kaj ne forte frapas ĝian randon, ili turniĝas laŭ ĝia ritma vibrado. Iuj harfiguroj turniĝas dekstren, aliaj maldekstren, kun armiloj koliziantaj unu kun alia, kvaŝaŭ du militistaroj interbatalus. Pro tio la pekinanoj nomas tion teatro sur telero.

Jam en la mezo de Qing-dinastio (1644-1911), la pekina opero evoluis en kortegan arton. La harfiguro havas en si intensan koloron de kortega arto. En 1915 la harfiguroj faritaj de Wang Chunpei gajnis arĝentan medalon en la Panama Universala Foiro. Tiam liaj harfiguroj ĝuis renomon kaj vendiĝis en ĉiuj grandaj foiroj en Pekino.

Wang Chunpei heredigis la metiarton al sia filo Wang Hanqing (Ŭang Hanĉing). La filo povis fari ne nur diversajn harfigurojn imititajn laŭ roloj de pekina opero, sed ankaŭ harajn artaĵojn pri la popola vivo de Pekino, kiaj ludo de surtera boato, stilzoido, azenkuro kaj leondanco. En la mezo de la 50-aj jaroj de la kuranta jarcento dekoj da harfiguroj kaj haraj floroj faritaj de s-ro Wang Hanqing estis laŭdataj en la Ĉina Metiartaĵa Ekspozicio okazigita en Sovetunio.

La harfiguroj eksponataj kaj vendataj nun estas faritaj de s-ro Bai Dacheng, popola artisto de la manĉura nacio. De la infaneco li ŝategis la pekinan operon, pentradon kaj modladon de argilfiguro. En 1959 li komencis fari harfigurojn. Poste, li konsultis


metiartiston s-ro Wang Hanqing. Surbaze de la tradicia metiarto de Wang-familio, s-ro Bai plibonigis harfiguran faradon kaj ekhavis sian propran apartaĵon. Ĉiuj liaj cent harfiguroj estas imititaj laŭ roloj de 40-50 pekinaj operoj.

La harfiguroj de Wang-familio estas faritaj el papero, kun tubforma korpo kaj moveblaj brakoj kaj sen kruoj. La harfiguroj de s-ro Bai havas pli da karakterizaĵoj de la arto de la pekina opero. Ili portas silkajn kostumojn kun koloraj desegnoj. La vizaĝoj, delikate faritaj, tre similas al tiuj de roloj de pekina opero, la korpoj estas proporcie projektitaj kaj la piedoj videblas sub la kolora pantalono.

La brakoj kaj korpo de la harfiguro estas pufigitaj per kotono kaj kunigitaj per feraj dratoj; la korpo fiksita sur la soklo; kaj la kapo modlita el argilo. Iuj harfiguroj havas moveblan akson en la mezo de la mano. Kiam la harfiguroj turniĝas, la brakoj balanciĝas kaj la armiloj en la manoj, kiaj glavo, lanco, vipo kaj martelo, svingiĝas unu post alia, kio impresas pli forte ol la harfiguroj de Wang-familio.

Kial la harfiguroj povas movi sin sur la latuna telero? Ĉar la argila soklo de harfiguro estas ronda kaj ĝia malsupra parto surhavas sennombrajn porkoharegojn longajn je du centimetroj, kiuj formas haran bazon pli altan ol la soklo je unu centimetro. La haroj kaj la peza soklo subportas la harfiguron kaj la flekseblaj haroj turnas la harfiguron, kiam la telero vibras. La haroj viciĝas en malsamaj direktoj kaj anguloj, la harfiguroj turniĝas dekstren aŭ maldekstren, rapide aŭ malrapide, tiel ke sur la telero vidiĝas versimila batalo.

En la pasintaj jaroj s-ro Bai kreis novtipajn harfigurojn. La 80-centimetre altaj harfiguroj simio Sun Wukong, dioj Erlang kaj Juling (Ĝjuling), herooj de la fama ĉina mita romano "Pilgrimado al la Okcidento", estis eksponataj en Tokio kaj bonvenigataj de japanoj. Specialistoj de la Arta Buroo de la Franca-Ĉina Amikeca Asocio alportis harfigurojn al Francio kaj emisiis kompletan da poŝtkartoj pri harfiguroj. ■





# Ledaj vestoj kun marko

## “GRANDA PANDO”



Ledaĵ-fabriko de Jining (Ĝjining) de la Interna Mongolio de Ĉinio produktas ledon, ledajn vestojn kaj aliajn ledaĵojn. La produktaĵoj de la fabriko kun historio de pli ol 30 jaroj vendiĝas en Ĉinio kaj aliaj landoj.

La ledaj vestoj kun marko “Granda Pando”, liberaj de dogana kvalita kontrolo, estis plurfoje premiitaj de la aŭtonoma regiono kaj la Malpez-industria Ministerio de la lando. En 1990 kaj 1991 la produktaĵoj de la fabriko gajnis arĝentajn medalojn en la internacia foiro.

La fabriko uzas avangardajn maŝinojn faritajn de Italio kaj Francio kaj aplikas la usonan teknikon de tanado. La fabriko produktas ĉiujare 600 000-800 000 pecojn da ledo kaj 30 000-50 000 ledajn vestojn. La produktaĵoj de la fabriko fajne tajlitaj kaj mode fasonitaj estas tre ŝatataj de la publiko. La fabriko servas ankaŭ per farado de konfekciaj vestoj el materialoj de klientoj.


La fabriko serĉas kunlaboron kun alilandaj klientoj kaj promesas liveri produktaĵojn de plej bona kvalito.

Fabrikestro Jiang Xuewen

Adr.: Gongyuanlu 2, Jining,  
Interna Mongolio  
012000 Ĉinio  
Tel.: 0474-232076  
Telegramo: 4122



ISSN 0032-4361



9 770032 436009



世界语《中国报道》一九九四年第一期

(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339 / G2